

19793/44 (1956)

Esperanto

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Majo 1956

44-a jaro N-ro 5

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET



Vald. Langlet
prez. 1906—1909

1906

ORA

JUBILEO

SEF

1956



Jan Ströme
prez. 1948—



Mia unua konatiĝo kun la Lingvo Internacia

Esperanto okazis jam antaŭ 67 jaroj. Kiel 15-jara gimnaziano en Uppsala mi tiam jam lernis la lingvon "Volapük" de Schleyer. Sed okaze venis en miajn manojn la unua sveda lernolibro en Esperanto, verkita de unu certa sro Henrichundqvist kaj farita en la formo de unu folio gramatiko (16 reguloj) kaj malgranda vort... "aro!"

Mi tuj komprenis ke la Lingvo Esperanto de dr Zamenhof havis tute alian eblecon por esti akceptita kaj uzata kiel internacia ligilo ol la malfeliĉa produkto de pastro Schleyer. Konstruita sur iomete egala fonda (la uzo de jam grandparte internaciaj vortradikoj) kiel V-pük sed ellaborita el la klara vidpunkto: uzebleco kaj skribe kaj parole, la lingvo Esperanto posedis tute alian eblecon por plenumi la esperon de tiel multaj popoloj por interkompreniĝi, nur ellerninte unu simplan kaj facile kompreneblan "lingv-ilon" — flanke de la gepatra lingvo — anstataŭ studi 3—4 diversajn, malfacile lerneblajn fremdajn lingvojn.

Kiel respondon je miaj unuaj artikoloj pri Esperanto en la Uppsala-gazeto "Fyris" la ĉefredaktoro de la gazeto, mia bona amiko (pli malfrue profesoro de latina lingvo) Vilhelm Lundström publikigis malmolan, "malsukeran" kritikon en unu numero de *l'gazeto* dum la jaro 1890. Interalie li diris ke la t.n. "Esperantistoj" eble povus interkorespondadi en Esperanto kaj iomete kompreni unu la alian, sed eĉ plej malgranda interparolado estus tute certe neebla — kaŭze ke ĉiu landano sendube estus parolanta tiun t. n. "lingvon", en sia propra nacia uzado.

De mia flanko mi respondis je tio: se du membroj el diversaj nacioj, kiuj ne komprenis la propran lingvon, unu de *l'alia* kaj tial estus devigitaj paroli en tria nacia lingvo (ekz. italo kaj germano parolante en la franca lingvo) ili certe komprenus unu la alian tute bone, kvankam iomete aliel elparolante tian por ambau homoj fremdan lingvon! Tute same ili komprenus unu la alian se ili interparoladus en esperanto, kvankam malgranda diferenco en voĉkoloro, akcento k. t. p. montrus ke ili ne havis la saman hejman lingvon.


Nun, kompreneble, mi estis devigita praktike pruvi la veron de mia tezo! Do mi volonte akceptis inviton de rusa esperantistino, loĝanta en Jalta sur la duoninsulo Krim, vojaĝi tien kaj loĝi unu monaton en ŝia hejmo. Mia patro donis al mi la tiam grandegan sumon de 200 sv. kr. kaj per helpo de tia "kapitalo" ebligis la unua granda vojaĝo esperantista en Eŭropo, ne, en la tuta mondo! Okazis en la monatoj majo—julio 1895 kaj trapasis ĉ. 5.000 km tra 7 diversaj landoj. Mi parolis esperante kun membroj de tiuj nacioj sen ia malfacileco. La prava argumento estis montrita!

Du jarojn poste mi veturis tra Rusujo per ĉevalo rajdante pli ol 1.500 km dum 3 + 3 = 6 semajnoj

de la kozaklando (en la SO Rusujo) fine al ĉefurbo S. Petersburg (nun = Leningrad). Dum miaj vojaĝoj en Rusujo mi konatiĝis kun multaj bonegaj amikoj, interalie kun Nikolaj Borovko kaj Antonina Ĉajkovskaja. Iligeedziĝis kaj 25 jarojn pli poste ilia filino Nina fariĝis mia edzino! Demandu ĉu mi estas kontenta ke mi — antaŭ 67 jaroj! — kuraĝe ellernis la lingvon Esperanto? Mia edzino bedaŭrinde ne lernis esperanton sed estas fiera ke ŝia patrino estis la forta virino kiu siatempe per forta, senlaca laboro savis la kreaĵon de nia kara dro Zamenhof de *l' danĝero* esti mortigita per — Ido!

Stockholm la 18.4.1956

Valdemar Langlet



Paul Nylén

Prezidanto de SEF dum 25 jaroj kaj ĝia honora prez. de post 1921

Jan Strönné:

La ORO RESTU!

La tempo flugas kaj flugas rapide! La ido, kiu travivis tiom da krizoj, mondmilitoj, estrarŝanĝoj ktp, tamen estas 50-jara. Ĉu SEF bone plenumis sian taskon? Sendube jes. En nia longa, vasta lando, kie la multekostaj vojaĝoj malhelpas oftajn kontaktojn inter la gesamideanoj, la tute ne multnombra homgento kreis Esperantofederacion, kiu faris sian plejeblon por informi pri nia Internacia Lingvo.

Oni fidus je la estonteco, kiam homoj loĝantaj en Laponio oferas siajn lastajn kronojn por iri al esperantista kuneŝtado, kaj kiam la oferemo entute ebligas al nia federacio efike labori kaj agi en la verda familio.

Sveda Esperanto-Federacio okupas alte taksatan lokon inter la Landaj Asocioj, ni ĝojas pri bona organizo, sed ni prefere fieras pri la multnombraj, spertaj kunhelpantoj, kiuj hodiaŭ kreas nian federacion.

Al mi apartenas la tasko direkti al ĉiuj koran kaj varman dankon pro la laboro farita kaj farata. Estas tute neeble menci i nomojn. Ĉiuj agas laŭ siaj eblecoj kaj kunhelpas por la komuna afero. Ni ĝojas pro tio, ke ne ekzistas kverelo, batalo, miskompreno aŭ subfosa agado en nia movado. Ni agas harmonie kaj fervore. Tio estas unu el la ĉefaj kaŭzoj, ke ekzistas forta movado en malgranda lando.

Ora Jubileo estas. La oro, kiu brilas nun, tamen restu kaj origu la estontan agadon. Ni esperu forte ke estu tiel konsiderante la multajn novajn ideojn, kiuj vekigas ĉie en la lando, la energion, kiun montras la multaj kursanoj, kaj la iniciatojn, kiujn prezentas niaj kluboj eĉ en malgrandaj urbetoj.

La oro restu! Tio signifas ke ni ĉiuj devas streĉi niajn fortojn por konservi la jam atingitajn rezultojn. La tuta esperantistaro tre ofte rigardas al ni, demandas, petas konsilojn, serĉas ideojn. Ni montru ankaŭ estonte, ke Sveda Esperanto-Federacio ne nur batalis por festi sian Oran Jubileon. Ni arangis ĝin por ke

La ORO RESTU!

La prezidantoj de SEF 1906—1956

Valdemar Langlet	1906—1909
Albin Zachrisson	1909—1913
John Lundgren	1913—1918
Paul Nylén	1918—1921
G. Hedström	1921—1923
Paul Nylén	1923—1945
Ernfrid Malmgren	1945—1948
Jan Strönné	1948—

Jubilea kavalkado

Fondiĝas Federacio

Reprezentantoj de la kluboj esperantistaj en Stockholm, Uppsala, Falun, Eskilstuna, Karlshamn, Malmö kaj Södertälje estas vokitaj al Stockholm por kunveni kun granda nombro da izolaj esperantistoj de plej diversaj partoj de Svedujo.

Ni skribas la 1-an de decembro en la jaro 1906.

Je la 8-a horo vespere kolektiĝas la alvenintaj esperantistoj en la restoracio "Hellmans matsalar", Drottninggatan 68 kaj la plej multaj vidas unu la alian por la unua fojo. Kiel gvidantojn de la kunveno oni elektas D-ron S. Krikortz, prezidanto kaj s-rojn G. Löfvenmark kaj P. Ahlberg, sekretarioj. Post mallongaj sed viglaj paroloj oni estas preta decidi pri fondo de tutlanda asocio nomata "Svenska Esperantoförbundet — Sveda Esperanto Societo". Sekvas detala diskutado pri la societa regularo, kiun oni fine fiksas kaj povas transiri al elekto de komitato prizorgonta la taskojn de la nova societo. Por la t. n. plenuma komitato oni



P. Ahlberg



S. Krikortz

elektas prez. red. Valdemar Langlet, sekr. s-ro P. Ahlberg, vicprez. d-ro S. Krikortz, kasisto ing. Engelbrekt Olson. Por kompletigi la societatan konsilantaron oni krome elektas: poŝtekspedisto Karl Holm, teol. kand. Gunnar Löfvenmark, fil. kand. K. Eriksson, ĉiuj el Uppsala, dir. H. S. Hermod, Malmö, stud. Albert Östberg, Falun, ĵurnalisto Edvin von Schöelee, Ronneby, doganoficisto Birjer Ström, Härnösand kaj fervoja oficisto John Lundgren, Hedemora. Kiel honoran prezidanton oni elektis doktoron Zamenhof, kiu post informo pri tio danke akceptis la honoron.

La unua paŝo en la komuna laboro tutlanda por Esperanto estas farita.

Sekvas jaroj de aktiveco — oni ĝojas pro prospero kaj trabatalas atakojn de perfiduloj kaj mokantoj.

Flirtas la verda flago unufoje

En la unua jaro post la fondiĝo SES festas la 20-jaran jubileon de Esperanto en Skansen, Stockholm. Multaj samideanoj partoprenas kaj la unuan fojon la esperanta flago flirtas ekstere en la sveda ĉefurbo. Profesoro Forel el Zürich ĉeestis kaj parolis.

Universala Esperanto-Asocio fondiĝas en la jaro 1908. SES havas sian unuan jarkunvenon. En Dresden, Germanujo, la Sveda Esperanto-Teatro ludas du teatraĵojn de Aug. Strindberg "Pario" kaj "Fraŭlino Julie".

En la decembra numero de "Esperantisten" P. Ahlberg, la sekretario de SEF, en artikolo "Ĉe Rubikon" konfesas sian reformemon kiel idisto. Tiel la gazeto ĉesis esti la oficiala organo de la Societo. En 1909 Esperantisten en ido kontraŭbatalas Esperanton. La idista krizo fariĝis aktuala en nia lando. La provo de Ahlberg kaj aliaj al militi al si la Societon malsukcesis.



La zamenhofa Esperanto venkis kaj oni reorganizis la Societon. Ek de 1910 ĝi portas la nomon Sveda Esperanto-Federacio por ke la komencliteroj SEF konvenu por ambaŭ lingvoj. Prez. nun estas Zachrisson, vicprez. Nylén, sekr. F. Skog, kasisto Rosén. En marto aperas la unua numero de "Sveda Esperantisto" kies redaktoro estas John Lundgren en Hedemora. Li aranĝas kaj gvidas karavanon kun turistoj el 7 landoj kiu estas bone atentata de la gazetaro ĉie en nia lando.


Sveda "La Espero" naskiĝas

Carl Lindhagen metas la problemon de tutmonda lingvo al la decido de la sveda parlamento. En tiu ĉi jaro — 1911 — G. H. Backman en Hälsingborg aperigas novan gazeton "Esperanto-Folket". Kaj en 1913 la esperantistoj en Gävle prenas sur sin la taskon eldoni organon por la sveda movado kaj donas al ĝi la nomon "La Espero". Redaktoro fariĝas la 18-jara Rudolf Pehrson.

Koresponda kurso farita de Hjærtstedt en Kristinehamn aperas dum 1914 en la semajna gazeto "Såningsmannen".

Dum la jarkunveno de SEF en Norrköping 1915 oni ludis teatraĵojn en kiu partoprenis i. a. Sven Jerring (kiu poste fariĝis nia plej konata radioanoncanto) kaj Leander Tell (same bonkonata pro siaj grotesploradoj).

La jarraporto diras en 1916 ke la financa stato estas bona kaj ke la propaganda folio disvendigis en 10.000 ex.



Organo de Sveda Esperantista movado — 1909.

Dua Jaraokto Nr. 8. Aŭgusto 1906.



Skandinavoj kongresas 1918.

Kunvenante en Skara 1917 la vicprezidanto Nylén malfermas la laborkunsidon rememorigante per kelkaj kortrafaj vortoj pri la grava perdo, kiun kaŭzis la morto de nia majstro d-ro Zamenhof.

La Skandinava kongreso de Esperanto okazas en Göteborg en 1918. La plej grava decido farita dum la jarkunveno de SEF estas tiu pri la fondo de Eldona Societo Esperanto. Cetere la kongreso faris i. a. jenajn decidojn (kiuj iom similas al la hodiaŭaj!):

- rekomendi eldonon de propagandiloj por neesperantistaj kongresoj;
- rekomendi starigon de instituto por instruado per korespondo;

- aprobi proponon kolekti eldirojn de aŭtoritatuloj de komerco, tekniko, scienco ktp por propagandiloj;
- interesigi la telegramoficejojn anstataŭigi la diversajn naciajn lingvojn per Esperanto en internaciaj rilatoj.

En 1919 oni decidas, se eble, translokigi el Gävle al Stockholm la presadon de la gazeto kaj klopodi por efektiviigi tie esperantan oficejon komunan por la federacio, eldonejo kaj gazeto. Wahlund donacas 500 kronojn por ebligi presigon de la broŝuro "Esperanto eller Ido".



John
Lundgren,
Hedemora

Reĝo Gustavo V-a akceptas en aŭdienco la 30.11.1920 la prezidanton de SEF Paul Nylén, kiu petas apogon de Lia Reĝa Moŝto al peto al la ministro de edukado pro prova instruado de Esperanto en lernejoj. La reĝo montras grandan intereson.

Rektoro Jansson aperas

Rektoro Sam Jansson aperas unuafoje inter la esperantistoj en Stockholm la 13.10.1921. La problemon pri ekzamenoj li tuj per lerta mano solvis.

Ĉe la jarkunveno 1922 en Malmö oni konstatas ke SEF konsistas el: 10 grupoj kun 336 anoj plus 131 apartaj membroj, sume 467. La gazetara komitato raportas, ke ĝi dum sia 8-monata ekzisto aperigis pli ol 600 artikolojn pri esperanto en diversaj gazetoj. Oni

decidas pri fondo de Ekzamena komisiono de SEF (kiu poste en la jaro 1929 ricevis la nomon Sveda Esperanto Instituto).

Tiuj kiuj ĉeestis la jarkunvenon en la Beskowa lernejo en Stockholm 1923 povis aŭskulti la operkantiston Folke Andersson kanti la Himnon laŭ nova melodio ludata de la komponisto Gösta Jahn. En tiuj jaro kelkaj membroj forlasis la Federacion por fondi novan organizaĵon sub la nomo Sveda Laborista Esperanto-Asocio.

La superan ekzamenon trapasis en septembro 1924: E. Malmgren, Stockholm, Bernhard Eriksson, Ludvika, Gustaf Johansson, Falun, Viktor Bonde, Falun kaj Erik Carlén, Örebro. La jarkunveno akceptas rezolucion kontraŭ la dualismo de la sveda organizo esperantista kaj diras "pli bone unu forta asocio ol du malfortaj kun duoblaj kostoj".

Korespondkursoj senpage

Senpaga koresponda kurso de SEF komenciĝas en aprilo 1925. Post malpli ol unu monato 500 mendoj kiuj kreskis konstante kaj ampleksis 4000 ĉiujare.

La radioaparatoj fariĝis pli kaj pli ĉiesposedaĵo kaj la esperantistoj tuj atentis la novajn eblecojn disvastigi la lingvon. La jarkunveno en 1926 decidas fari novan atakon al la Radioestraro por disaŭdigo de esperantokursoj.

Esperanto en la radio

Eskilstuna. Rondradiejo aranĝis dissendojn dum la jarkunveno 1927. Paroladis red. Nylén pri "Världsspråkstanken" (la Ideo de la mondlingvo); f-ino M. L. Root el Pittsburg, USA pri "Impresoj el 6-jara esperantista vojaĝo" kaj rektoro Jansson pri "Freds- och esperantodagar i Prag" (pripacaj kaj esperantaj tagoj en Prago). Dum tiu kunveno oni ankaŭ raportas pri sukcesa esperantokurso dissendita de la radiejo en Falun. La plej grava decido ĉe la sama kunveno estas: aranĝi propagandan rondvojaĝon de Pastro Andreo

ĈE

Kaj li venis al nia lando en oktobro, rompis la murojn kaj igis la svedojn interesi sin pri nia lingvo en tia amplekso, ke oni neniam antaŭe spertis ion similan. La kursfiniĝoj en la pompa koncerta domo de Stockholm fariĝis dolĉa venko same por la instrukapableco de Ĉe kiel por Esperanto.

Sekvis lin Morariu, Seppik, Elinjo Pähn, Szilágyi kaj aliaj. Ĉiuj kontribuis al la plej grandaj sukcesoj iam akiritaj en nia lando. Jen kion diras la statistiko de tiuj jaroj:


Studrondoj de ABF (Laborista Kleriga Asocio)

	1926/27	1927/28	1928/29	1929/30
Esperanto	65	149	266	251
Angla lingvo	128	155	156	263
Germana lingvo	38	42	43	63

La sveda parlamento unuafoje en 1929 asignis sumon de 2.900:— kronoj por instruistaj kursoj en Esperanto.

Eldona Societo famiĝas

En la komenco de decembro 1930 aperas ĉe Eldona Societo la impona verko "Per balono al la poluso" kaj per la radio ni povas aŭskulti disaŭdigojn pri Esperanto duonhoron unuafoje en la monato. Lakŝmisvar Sinha el Bengalujo faras la superan ekzamenon de Sveda Esperanto-Instituto.



La 25-an de majo 1931 SEF jarkunsidas en la urbodomo de Stockholm. Samtempe okazas ĝia 25-jara jubileo. La fondintoj de la unua esperantoklubo en Svedujo (1891) d-ro A. F. Runstedt, pastro J. A. Lundström kaj paroĥestro O. Zeidlitz, fariĝis honoraj membroj kune kun red. W. Langlet, s-inoj C. Wieslander kaj H. Cederblad-Thisell.

17.000 svedoj petskribas

17.000 svedoj subskribis petskribon pri radio-programoj en kaj pri Esperanto, kiun oni transdonis al la radiodirektoro Rabe en majo 1933. La kronprinco vizitas esperantan ekspozicion en Hotelo Regina.

La XXVI-a Universala Kongreso de Esperanto okazas en Stockholm en aŭgusto 1934. Pli ol 2.000 esperantistoj aliĝis kaj Heroldo skribas pri ĝi: "Unu el la plej agrablaj, plej bone organizitaj, plej bonsukcesaj el ĉiuj ĝisnunaj kongresoj . . ."



Sveda Esperanto-Federacio aliĝas en 1936 al la novfondita Internacia Esperanto-Ligo, kiu ankaŭ havas stockholman filion gvidatan de Malmgren.

En 1937 oni ĉie festas la 50-jaran jubileon de Esperanto kaj SEF jarkunvenas en sia ĝis nun plej norda urbo, Sundsvall. Profesoro Björn Collinder faras interesajn radioparoladojn pri Esperanto.



**Profesoro
Björn Collinder,
Uppsala**

Eldona Societo festas sian 20-jaran jubileon en 1938 kaj la kunfondintoj daŭre aktivus en ĝia estraro. Kaj ili povas fiere rerigardi la rezultojn: Sveda Antologio, Gösta Berling, Per balono al la poluso, Tra sovaĝa Kamĉatko, La homaj rasoj, ampleksaj vortaroj, grandkvante eldonitaj lernolibroj ktp.

Severa bato trafas la svedan movadon, kiam rektoro Sam Jansson mortas la 30.9 1939.

Fejde indikas sindikon

Dum la jarkunveno en Stockholm 1940 oni decidus provi dungi sindikon. Kaj dank' al ege energia kaj sindona laboro de s-ro Martin Fejde la bezonata garantikapitalo kolektiĝas en la kaso de SEF tiel ke oni estas preta jam en 1941, en Uppsala, subskribi kontrakton kun red. Morariu. Kaj li ekagis la 1-an de julio kaj vere sciis revivigi la dormantajn klubanojn tie kaj tie en nia lando.



25-jara jubileo 1931.

La Unua Somera Universitato okazanta kiel memstara institucio estis vizitebla en Lund-Malmö en junio 1943, tuj post la jarkunveno en SEF en Hälsingborg.

Anstataŭ la universalaj kongresoj malebligatajn de la milito oni aranĝas en Stockholm konferencon pri "La popoloj ĉirkaŭ la Balta Maro kaj iliaj pacproblemoj", laŭ iniciato de Malmgren en 1944.

La unua postmilita preleganto eksterlanda estas Josef Vitek el Prago kiu venas al ni en 1946. Oni rimarkas vekigantan intereson por nia afero.

IEL kunfandiĝas kun UEA por novorganizita Universala Esperanto-Asocio kaj Malmgren — la ĝisnuna prezidanto de SEF — fariĝas la nova UEA-prezidanto en la jaro 1947. La jarkunveno en tiu jaro faris gravan decidon post multjara diskuto pri t. n. deviga abono je la Sveda Esperanto-Gazeto por ĉiu membro de SEF.

Svedlando kaj ĉiĉoj de la urbo Malmö gastigas la Universalan kongreson en 1948.

Rektoro Karl Söderberg, Uppsala, gvidis la ĉiulandajn radioelsendojn en Esperanto dum 1949.

Ŝtate subvenciitaj esperantokursoj por instruistoj estas aranĝataj dum 1950 en Uppsala. Samjare oni transdonas al la Unuigitaj Nacioj la petskribon por Esperanto kun la nomo de 175.991 svedoj.


"La nuntempa Svedlando" estas novspeca kurstipo aranĝata de Sveda Esperanto-Instituto en Bohusgården, Uddevalla, dum 1952. La ŝtato kontribuas al la aranĝo, kiu kolektas partoprenantojn el 14 landoj. Sekvanta okazas en Frostavallen unuafoje la Sveda Somera Semajno sub gvido de Jan Strönnö.

La gotenburgaj esperantistoj jubilas kaj jubiligas la svedajn esperantistojn per la sciigo, ke la urbaj aŭtoritatoj decidis bapti novkonstruitan centron per la nomo "Esperantoplatsen". En la sama jaro, 1954, profesoro Ivo Lapenna jubiligas la tutan esperantomondon per la informo, ke Unesko rekonas Esperanton kaj donas al UEA konsultan pozicion.



85-jara Paul Nylén partoprenas en la 40-a universala kongreso en Bologna, Italujo, kiel oficiala reprezentanto de Svedlando.

S. W. Ahlm



Jen "Tegelbacken", la oficejo de SEF.

SEF Jarkunvenis en 22 urboj 17-foje en Stokholmo

1.12 1906	Stockholm	La fondiĝo
16. 4 1908	Stockholm	La 1-a jarkunveno
12. 4 1909	Stockholm	La Ido-skismo
10.10 1909	Stockholm	Ekstra kunveno por reorganizo
29. 8 1911	Hälsingborg	"Esperanto-tagoj"
14. 7 1912	Stockholm	(dum la olimpaj ludoj)
6. 7 1913	Gävle	Statutŝanĝoj
26. 7 1914	Malmö	"Baltaj Esp-istaj tagoj"
11. 6 1915	Norrköping	Propono pri rondvojaĝo de oratoro
29. 7 1916	Stockholm	"Tutsveda Esperanto-Tago"
23. 6 1917	Skara	Propono pri Eldonejo
6. 8 1918	Göteborg	"Skandinava kongreso", Fondo de Eldona Societo
7. 6 1919	Stockholm	Tell-aranĝita ekspozicio
22. 5 1920	Gävle	Propono al ABF pri prelegistoj
25. 3 1921	Falun	Nylén honora prezidanto
14. 4 1922	Malmö	Ekzamena konsilantaro
19. 5 1923	Stockholm	Diskuto pri instruistaj kursoj
7. 6 1924	Stockholm	Rezolucio kontraŭ la dualismo
10. 4 1925	Ludvika	Propaganda fondaĵo
23. 5 1926	Örebro	Sinturno al la Radioestraro
4. 6 1927	Eskilstuna	Propono pri venigo de Ĉe
26. 5 1928	Stockholm	Diskuto pri kolektivaj aliĝoj
18. 5 1929	Uppsala	Esperanto-Instituto fondiĝas
6. 6 1930	Stockholm	Aranĝoj por la unua sindiko
24. 5 1931	Stockholm	25-jara jubileo
14. 5 1932	Eskilstuna	Diskuto pri statutŝanĝo
3. 6 1933	Norrköping	Radiopetskribo de 17.000
19. 5 1934	Södertälje	Deziro pri infanlernolibro
8. 6 1935	Göteborg	A-membroj apogu SEF
30. 5 1936	Malmö	Skandinavkongreso proponita
20. 3 1937	Sundsvall	"Esperanto-per-post" propagandilo
4. 6 1938	Arboga	Planoj pri nova sindiko
27. 5 1939	Skövde	Kurso en 100 svedaj gazetoj
14. 7 1940	Stockholm	Decido pri dungo de sindiko
31. 5 1941	Uppsala	Kontrakto kun nova sindiko
23. 5 1942	Borås	Nova fluganta ekspozicio
12. 6 1943	Hälsingborg	Preparo por postmilita agado
27. 5 1944	Karlskoga	Deviga abono diskutita
19. 5 1945	Stockholm	Amikaro de Esperanto
8. 6 1946	Uddevalla	Junulorganizo kaj fak-sekcioj
24. 5 1947	Gävle	Prelegvojaĝo de Vitek. Deviga abono
15. 5 1948	Stockholm	Kune kun SLEA unuafoje
4. 6 1949	Skövde	Raporto pri multaj radioelsendoj
27. 5 1950	Norrköping	Esperanto sur respondkuponoj
12. 5 1951	Leksand	ETK-reviviĝo en SEF
31. 5 1952	Stockholm	Grava testamenta donaco al SEF
23. 5 1953	Halmstad	Sveda Somera Semajno estiĝos
5. 6 1954	Karlstad	E-placo en Gotenburgo
9. 4 1955	Malmö	Laboro post Unesko-venko
19. 5 1956	Stockholm	Ora Jubileo de SEF

Jubilea programo



Pentekostan sabaton, 19.5.56

- h. 17a nia akceptejo malfermiĝas
- h. 19.30 la "interkonatiga vespero" kun tagmanĝo kaj danco.

Pentekostan dimanĉon 20.5.56

- h. 9.00 kunveno de Eldona Societo
- h. 10.00 jarkunveno de SEF
- h. 12.30 paŭzo por lunĉo
- h. 13.30 fakkunsidoj
- h. 15.00 jubilea festprogramo kun festparolado de la ĝenerala sekretario de UEA, profesoro Ivo Lapenna: La nuna stato de la esperanto-movado kaj perspektivoj pri la estonteco.
La Prezidanto de SEF: Rerigardo.
La veteranoj rememoras.
Salutvortoj de la Prezidanto de UEA k. c.
- h. 18.00 tagmanĝo
- h. 20.00 jubilea rapsodio
- h. 21.00 plia arta programo.

Pentekostan lundon 21.5.56

- h. 10.30 rondveturo per turista aŭtobuso en la novaj antaŭurboj de Stockholm; esp-ista turistgvidanto kuniras kaj donas informojn pri la urbo; la veturo komenciĝas kaj finiĝas ĉe Medborgarplatsen
- h. 12.00 lunĉo; la lasta kunveno de la kongreso. (Vagonaro suden je la h. 13.15).
Ĉiuj kunvenoj kaj manĝoj okazos en Hotell Malmens festvåning.

*

Roland Dupuis en la Stokholma Esperanto-klubo preparas por la dimanĉvespero de Pentekosto Jubilean Rapsodion, kiu estos kvazaŭ revuo pri la 50-jara Federacio, kun artaj ilustraĵoj.

Ĝi konsistas el 40 eroj (20 deklamaĵoj kaj same multaj ilustraĵoj) plej variaj kaj mallongaj, jen amuzaj, jen altkulturaj.

DO KORAN BONVENON AL TIU SENDUBE
UNIKA FESTO

☆

Postverket

kommer att använda särskild datumstämpel för de försändelser, som inlämnas vid kongressbyrån i Stockholm i samband med SEF:s 50-årsjubileum.

Svenska Esperanto-Förbundet, Tegelbacken, Stockholm C, ombesörjer allt härvidlag.

Det vackra minneskortet kostar 40 öre. Likvid i frimärken eller till postgiro 2012. Skriv tydlig adress. Sänd senast den 16 maj. Tänk på Edra utländska korrespondenter.

Resultat av SEF:s NYCKEL-JAKT 1955

- 1:a pris Torsten Lund, c/o Larsson, Lundbergsgatan 19, 1 tr., MALMÖ. 300 kr.
- 2:a pris Stig Molander, Smedjegatan 18, MALMÖ. 125 kr.
- 3:e pris Elsa Croona, Trånggatan 10, SKÖVDE. 100 kr.

SEF bondeziras...

C.D.E.L. (Centra Dana Esperantista Ligo) bonvenigas vin al sia jarkunveno en Aalborg pentekoste.

En kunesto kun samideanoj vi havos okazon pasigi du belajn enhavriĉajn tagojn en la plej granda kaj bela urbo de Nordjuto.

Ĉar Aalborg havas tre konvenan situon kaj estas facile atingebla por vojaĝemuloj el niaj najbaraj landoj, ni atendas, ke multaj kaptas tiun ŝancon por viziti nin. Estu kore bonvenaj!

August Nielsen

prezidanto de LKK, Engvej 18, Mølholm, Aalborg

Finnlanda esperantokongreso
en Lappeenranta pentekoste.

Postkongresa aranĝo en Norvegujo

La landaj asocioj de Danujo, Norvegujo kaj Svedujo interkonsentis ke ĉiujare unu el ili aranĝu sian jarkunvenon ne dum Pentekosto, por ebligi al la membroj viziti kelkfoje ankaŭ la jarkunvenon aŭ kongreson de la najbaraj landoj, en la espero tiel plifortigi la kunlaboron. Ĉi-jare la vico venis al Norvegujo, kaj Norvega Esperantista Ligo decidis okazigi sian jarkunvenon en Oslo dimanĉon la 12an de Aŭgusto, de tuj post la kongreso en Kopenhago.

Estas la espero de la estraro de NEL ke ankaŭ gesamideanoj ekster la skandinaviaj landoj volos viziti la jarkunvenon kaj interŝanĝi kun ni spertojn kaj ideojn. Sed supozeble oni ne volas iri al Norvegujo nur por unu tago. Ni tial, interkonsente kun la LKK en Kopenhago, starigis planojn pri kelktagaj ekskursoj tra Norvegujo, kiuj ekiros el Oslo lundon matene la 13an de Aŭgusto. (Pro bedaŭrinda okazaĵo tiuj planoj ne trovis lokon en la 2a Bulteno de la Kongreso). Tiuj ekskursoj trapasos plej pitoreskajn, parte altmontarajn regionojn de Suda Norvegujo.

Interesiĝantoj povas ricevi ĉiujn detalojn ĉe: Postkongresa Ekskurso, Box 942, Oslo, Norvegujo.

C.Støp-Bowitz

... kaj gratulas

En **Hamburg, Pentekoston**, la Germana Esperanto-Asocio, festos la 50-jaran ekzistadon.

Pasis 50 jaroj en Oriento

50 jaroj pasis de kiam la Japana Esperantista Asocio fondiĝis en 1906. Kiam nia instituto, kiu heredis la asocion, festis en 1936 sian 30-jaran ekzistadon, oni skribis en la fronta artikolo de la jubilea numero de Revuo Orienta, ĝia organo, jenajn liniojn: "Dum la pasintaj 30 jaroj la vojo estis por ni ne glata nek ebena, sed kruda kaj plena je dornoj. Tiel ĝi estis hieraŭ, tiel ĝi estas hodiaŭ, kaj tiel ĝi estos ankaŭ morgaŭ." Kaj dum la sekvintaj 20 jaroj ĝi estis ĝuste tiel kiel oni antaŭdiris: Nia vojo estos ankoraŭ ĉiam malfacila, ni tamen marŝu nur antaŭen, alte tenante la verdan standardon.

Naskiĝo

La 2-an de majo naskiĝis la unua filo de la antaŭa redaktoro de "La Espero" Bengt Joelsson kaj lia edzino Anne-Mari.


Artur Wallin 70-jara

La 22-an de majo 1956 iĝos 70-jara la ĉiam vigla kaj junece energia A. Wallin iama sekretario de la Svedaj Kristana pacunuigo kaj Kristana Esperanto-Ligo.

Niajn tutkorajn gratulojn kaj dian benon por sana vivdaŭriĝo!



Ni funebras



Hans Andersson

Veterano tiel de la esperantomovado kiel en la Stokholma klubo esperantista. Hans Andersson, naskiĝis la 21-an de decembro 1873, forpasis kviete kiel li vivis, la 6-an de aprilo 1956, do en sia 83-a vivjaro. Li fidele partoprenis la kluban vivon, eĉ en la nuna jaro.

Malgraŭ ke li naskiĝis blinda, Hans Andersson akiris al si mirindan mezuron de klareco kaj komuna scio, studis fremdajn lingvojn kaj faris la superan ekzamenon de Sveda Esperanto-Instituto. Li ankaŭ vizitis kongresojn en fremdaj landoj, speciale la jubilean UK en Varsovio 1937.

La 14.4. ĉe la enteriga ceremonio la Klubo metis flo-rojn ĉe la ĉerko kun sia lasta adaŭo al la kara amiko kiu neniam vidis la belajn formojn kaj kolorojn de floro.

P. Nn.

Fredrik Skog

La 2-an de majo mortis redaktoro Fredrik Skog, Stockholm. Unu el liaj studentkamaradoj, Ad. Larsson, skribas pri li: "Jam en 1905 kiel juna gimnaziano en Falun li aliĝis al nia movado. Dank' al lia energio kolekti monon ni ambaŭ povis ĉeesti la jarkunvenon de SES en 1908. Ni memoras ankaŭ, ke dank' al la senlaca laboro de li kaj lia frato Harald, skribantaj al ĉiuj tiamaj esperantistoj kolektante voĉdonojn por la jarkunveno 1909, estis eble savi la Svedan Esp. Societon dum la idoskismo. En la sekvanta polemiko de la sveda gazetaro inter esperantistoj kaj idistoj li energie defendis Esperanton. — Li estis sekretario de SEF 1909—1912 kaj 1917—1921. Li ankaŭ partoprenis la fondigon de la Eldona Societo kaj estis ĝia sekretario 1918—1919. Ankaŭ por UEA li multe laboris kaj havis grandan internacian korespondadon. S-ro Skog oferis multe da laboro por kolekti ĉiujn datojn pri la sveda esperantomovado kaj laŭ admono de Eldona Societo li verkis la Historion de la sveda esperantomovado. La manuskripto estas preta ĝis la jaro 1934."


La enterigo okazos lunde la 14.5 ĉe Trons kapell en Skogskrematoriet je la h. 10.00.



Eldonaĵoj okaze de Ora Jubileo de KEM.

- I. EL LA HISTORIO DE KLUBO ESPERANTISTA DE MALMÖ. Kroniko pri la klubo vivo dum 50 jaroj, verkita de Gösta Henriksen.
 - II. SISTEMA LIBROLISTO DE LA BIBLIOTEKO DE KLUBO ESPERANTISTA DE MALMÖ, Katalogo de pli ol mil libroj kun enkonduka diskuto pri la klasifistemo.
- Multobligitaj. Prezoj: Po sv. kr. 1:50. Mendu per poŝtgiro 38714 ĉe Klubo Esperantista de Malmö, Kamregatan 3!

Okazoj kaj homoj



La Sveda Esperanto-Federacio vivis, agis, kreskis jam dum kvindek jaroj. Troviĝis mi en la centro de la okazoj, kiam ni preparis ĝin, kaj kiel kunfondito en 1906. Ni elektis kiel prezidanton la veteranon el Upsala, iniciatoron de "Lingvo Internacia", Valdemar Langlet, tiam redaktoro en Stokholmo. La entuziasmo kaj elokvento esperantista fajreris senrezerve verva en la festa kunesto ĉirkaŭ la lulilo de la Federacio (nomata dum la unua jardeko "Sveda Esperanto-Societo").

La aŭspicioj en tiu tempo estis tre prosperaj por nia lingvo, la gazetoj estis favoraj, la publiko scivolema.

Kiam la fervoruloj, kiuj ĝis tiam ensuziasme laŭdis Esperanton, subite en 1908—09 komencis laŭte kalamnii tiun lingvon, tiam la favoro de la gazetaro ŝanĝiĝis en skeptikecon. La ĵus fondita gazeto "Esperantisten" estis en la manoj de Ahlberg, sekretario de la Federacio kaj ĝia redaktoro, kaj tiu jam komencis energian propagandon por Ido kontraŭ Esperanto. En Dreseno ĉe la Kvara U. K. ĉiuj demandis min kun miro pri la situacio en Svedujo.

Jen epizodo de tiu kongreso. Komence de la jaro 1908 vizitis min en mia hejmo en Stokholmo s:ro Ivan Hedqvist, poste fama aktoro; li volis prezenti al la U. K. "Fraŭlinon Julie" de Strindberg; petis min traduki. Mi hezite opiniis, ke tiu teatraĵo malbone konvenas al la kongresa publiko heterogena, sed tion li ne komprenis. Nu mi tradukis; sed forte okupita, mi donis al d-ro Krikortz la 3—4 lastajn paĝojn plenumendajn. Ahlberg prizorgis (duonkore) la presadon kaj la pritraktadon kun la kongresa komitato. Tiu dediĉis sian tutan intereson al la famaj geaktoroj Emanuel Reicher kaj lia fratino Hedvig R., ludontaj "Ifigenion" en traduko de Zamenhof mem. Konkurencio ne estis bonvena! Por la trupo de Hedqvist (4 p.) ne estis do spaco en kongresa programo: "Oni ne malzorgis iun okazon por eviti anoncon pri ĝi", skribis ironie nia sveda raportanto. En Hotel Palmgarten en la tago antaŭ la malfermo de la kongreso ĉeestis tamen ĉ. cento da homoj (en ĉambro por milo). La prezentado estis brila. Boirac kaj Bourlet surprizitaj laŭdis. (Bourlet tuj ekpensis pri Eŭropa rondvojaĝo de la trupo!) — Al Hedqvist la entrepreno, pro manko de publiko, signifis ekonomian katastrofon. Li tuj vokis min malantaŭ la kulisojn: "Ĉu vi povas prunti monon por nia vojaĝo hejmen al Stokholmo." Mi, mia edzino kaj ŝia fratino havis po ĉiu kelkajn ormonerojn kiel vojaĝan rezervon; tio fariĝis la savo. (Post kelkaj tagoj la mono revenis telegrafe el Svedujo.)

En Stokholmo kaj en la provincoj ekbrulis tuj la lukto pro la animoj kaj pri la organizo. El Upsala dis-

sendis du studentoj Harald Skog kaj Bannbers alvokon kontraŭdistan al la membroj. Je la pasko 1909 estis okazonta la kongreso de la organizo, kaj tiam la idistoj certe almitos ĝin. Ili aranĝis rapid-kursojn, grandstile propagandis. Tamen — voĉdonado montris grandan plimulton esperantistan. Surprizo. Kolerio. Abdiko de la estraro. — La fidelaj anoj tuj reorganizis la Svedan Esperanto-Federacion; prez. fariĝis Albin Zachrisson en Karlstad, vicprez. Nylén kun la plenumkomitato en Stokholmo. Komence "Dana Esperantisto" pruntis al ni paĝon por niaj urgaj komunikoj; dum 1910 John Lundgren en Hedemora skribis mane unikan artistajn "Sveda Esperantisto", kiun litografis Holmström en Eskilstuna. La energia sed sennoma Backman en Hälsingborg aperadis sporade sian "Esperantofolket". De 1913 la viglaj kaj energiaj samideanoj en Gävle solvis definitive, per "La Espero", poste Svenska Esperantotidningen La Espero, la problemon pri gazeta organo de la federacio. Ni kare memoras la veteranojn Rud. Pehrsson, W. Wahlund, J. Helsing. Dum dudeko da jaroj furiozis en nia lando la pesto idista. Ilia tumulto kongreso en Parizo 1928 fine stampis la definitivitan fiaskon de Ido. Tiu malsano de la movado internacilingva ne povis ruinigi plene la fidon kaj konfidon de la publiko kaj de la gazetaro al Esperanto; tamen tiu frenezaĵo multe detruis kaj multe malfruigis.

De 1927 la esperantismo en nia lando plene realmitis al si sian lokon en la sunlumo. Tiam enpaŝis en nian historion Andreo Ĉe sub la beno de Sam Jansson kaj Laksmishwar Sinha sub gvido de Ernfrid Malmgren.

De tiam la Sveda Esperanto-Federacio kaj la tuta movado ĝuas konstante naturan kreskon kaj sanan vivon.



SUB AŬSPICIO DE UEA

Internaciaj Feriaj Esp-kursoj en Helsingör, Danlando

okazos 28/7—4/8 1956

do dum la semajno tuj antaŭ la kongreso en Kopenhago. Partoprenu ambaŭ aranĝojn.

Prospekto havebla ĉe:

L. Friis

Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danl.



El veterana vivo

Redaktoro
John Johansson

Estis en la jaro 1914:a. La milito ĵus eksplodis kaj la internacia esperantokongreso en Parizo nur estis malfermata por tuj poste esti fermata. La partoprenantoj je diversaj manieroj devis provi reiri al sia hejmo. Fraŭlinoj Hemberg kaj Josefsson per malgranda ŝarĝoŝipo tre marmalsanaj revenis post aventura vojaĝo trans Norda maro. Nia majstro, doktoro Zamenhof, havis la bonŝancon akompani la trajnon de la rusa vidvina imperiestro tra Svedio. Tiu trajno tamen ne iris tra Stokholmo, sed tra Krylbo, kial ni stokholmaj esperantistoj ne sukcesis renkonti la majstron. Mi tiutempe estis delegito de UEA. En tiu eco mi rajtis nur montrante mian delegitan karton eniri en la Centran stacidomon, kie tagon post tago kolektiĝis esperantistoj el la plej diversaj landoj, kiujn mi laŭ ebloj provis helpi. La centra staciadomo en tiuj tagoj estis plen-plena de diversaj homoj, kiuj devis tie restadi plurajn tagojn. Speciale mi memorigas al mi pri pola paro. Post tre akra disputo la edzino subite donis al sia edzo teruran vangofrapon, la minuton poste ili karesis unu la alian. Unu el la plej bonaj amikoj de la majstro, Adam Zakŝevski, trovis sur mia jako la kvinpintan stelon kaj kuris al mi, kisis min sur la buŝon, — unu el miaj konatoj en mia akompano sidigis sur strato pro konfuzo. Zakŝevski rakontis ke ili aranĝis por la majstro lokon en la trajno...

Pli malfrue venis el Germanio multaj rusaj esperantistoj, du el ili studis en la Berlina universitato kaj deziris nun daŭrigi en nia lando. Tiucele mi kunprenis ilin al profesoro Knut Kjellberg, tiam preleganta en la Laborista Instituto. La bonkora profesoro tre miris pri nia flua lingvo — estis la unua fojo ke li aŭdis ĝin. Li deklaris sin tuj preta rezervi sian privatan bibliotekon je la dispo de la du rusaj studentoj, sed — li rimarkis — anatomiajn studojn li ne povis aranĝi ĉar mankis mortintoj tiam...

Ankoraŭ pli malfrue venis trajnoj de sude plenaj de invalidoj kaj de norde ankaŭ kun militvunditoj. Inter ili multaj parolis nian lingvon. Laŭpove mi provis ankaŭ al ili helpi...

Post trijara milito multaj homoj en la militantaj landoj serĉis siajn parencojn, kiuj malaperis. Kune kun fraŭlinoj Hemberg kaj Josefsson mi tiam zorgis pri ampleksa korespondado inter la sin retrovintaj geparencoj — la militkaptitoj en unu lando kaj iliaj geparencoj en aliaj. Pluraj centoj da leteroj en tiu tempo estis interŝanĝataj. Tamen estis tre monavida entrepreno, ĉar ni devis provizi la leterojn en ambaŭ direktojn per svedaj poŝtmarkoj. Speciale fraŭlino Josefsson estis tre malavara en tiu entrepreno. Mi periode estis senlabora tiam kaj ne povis kontribui mone, sed mi donis mian laborforton des pli...

Antaŭ la milito la stokholma esperanto societo kunvenis en la hejmo de fraŭlino Karin Höjer, blindulino. De tiu periodo mi memoras pri la miro kiun elvokis Harald Thilander per sia vigla movado inter la presiloj kaj aliaj maŝinoj kaj kiel rapide li kunplektis diversajn

foliojn kaj el ili faris gazeton. Ofte ni tiam kantis la himnon laŭ la melodio de Claes Adelsköld — la nuna kreigiĝis nur pli malfrue...

En la unua klubo de mia esperantisteco, La Stelo en Eskilstuna, ni kunvenis ĉiusemajne kaj ni havis litran botelon staranta sur la tablo, en kiun ni devis meti unu oeron por ĉiu sveda vorto parolata. Laŭ la enhavo de tiu botelo ŝajnis ke oni tre ofte pekis... La estro de la Stelo estis tre lerta esperantisto Henning Holmström. Li ĉiamaniere provis aranĝi programojn. Ni ludis teatraĵon "Boks kaj Koks" kaj la kulisojn li faris el papero kaj ligno...

Joĉjo

Teodor Julin:

La jaro 1928

Mi ne plu povas rememori kiu energiulo sukcesis tambure kunvoki nin, sed devis esti Ernst Eriksson au Joĉjo Johansson. Vintran matenon en la jaro 1928 tamen sidis dudeko da parlamentanoj ĉirkau la granda tablo en la ejo de Konstitua komitato por tie studi novan metodon por lingva studado, ellaboritan de pastro el Rumanujo. Li mem montros la metodon. Kiam li eniris tuj komencis:

- Mi estas Andreo Ĉe. Kiu estas mi?
- Mi estas pastro. Kio estas mi?

Kaj ĉiuj devis diri siajn nomon kaj metion. Post la prezentiĝo sekvis demandoj pri "granda elefanto kaj malgranda hundo" kiuj ekstaris el la teko de la instruisto. Sume ne estis multaj vortoj por teni en la memoro, sed pastro Ĉe tiel amuze ĵonglis la vortojn, ke ni ofte devis ridi kaj la studhoro ŝajnis al ni tre mallonga. Ni promesis reveni ĉiun matenon dum la semajno. Post la tria de la matenaj lecionoj la interpretisto malaperis kaj ni devis helpi unu la alian, kiam temis pri traduko.

Jam post la unua leciono mi informis mian edzinon pri tio, kio okazis dum la frua mateno. Ŝi estis interesata kaj mi devis ripeti ĉion, kion mi sukcesis lerni. Post tri lecionoj ŝi komencis fabriki gramatikon kaj deklaris, ke ŝi volas aŭdi pastron Ĉe persone. Facile aranĝite, ĉar li predikas en la Beskova lernejo la proksiman dimanĉon.

Prediko ja plej ofte sin movas sur ĝenerale homa kampo kaj la prediko de pastro Ĉe ne estis escepto. Ni rigardis unu la alian kaj ambaŭ ni la samon pensis: Mirinde... Ĉi tie parolas rumana pastro en fremda lingvo kaj ni komprenas ĉion kion li diras...

Post tiu tago ni estis "perditaj". Mia edzino havigis al si legolibrojn kaj literaturon kaj estis post mallonga tempo preta por ekzameno. Mi venis pli malrapide laŭ ŝiaj spuroj sed poste ni kune retrovis aron de partoprenantoj en Ĉe-kursoj en la stokholmaj kluboj tie aplikantaj la admonon de la fama instruisto: Parolu kuraĝe, forte kaj elegante!

Pastro Ĉe tiam daŭrigis sian vojon al pli centraj lokoj de l' Eŭropo, sed aliaj — inter ili mia edzino Eva Julin — laŭ liaj impulsoj provis fosi internaciamaĵn sulkojn en la malmola tero de la perifera sveda lando.

Färgförstoring

i olja med kvalitetsgaranti

Storl. 18 × 24 cm kr. 8: —, 24 × 30 cm kr. 10: —,
30 × 40 cm kr. 12: —

Insänd film eller foto som återsändes

Ateljé WAGERLAND, Åkerström

„Alvenis la tempo, kiam ni devas ne nur streĉi sed trostreĉi niajn fortojn. Per eksploda aktiveco ni paralizos la hezitemon kaj la indiferentecon de la publiko. Tiamaniere en 5 jaroj nia lingvo estos atinginta sian oficialan, firman pozicion. Sed se ni ne dediĉos ekstreme malavare nian energion por nia afero, ni certe atingos la venkon de esperanto nur post pluraj jardekoj.”

Kiel juna kaj energia sekretario mi tiel alvokis la kongresanojn de nia federacio en unu el la unuaj jaroj post 1930, kiam nia lingvo ekfloris en Svedlando. Sed ho ve, esperanto ne venkis en 5 jaroj. Ni evidente ne trostreĉis la fortojn! Sed ankaŭ aliaj obstakloj intervenis. Ni esperantistoj, kiuj intencis paralizati la mondon per nia aktiveco, estis mem paralizitaj de la politikaj okazaĵoj internaciaj. Kaj ni devis dum la longa mondmilito streĉi la fortojn nur por vivteni la ideon de la internacia lingvo.

Tamen tuj post la milito rapide restariĝis la internacia kontakto. Plifortiĝis ankaŭ la komuna sento, ke la esperantistoj en la diversaj landoj devas pli firme kaj pli unuece kunlabori. Mi estas feliĉa konstati, ke tiu kunagado, gvidata de nia internacia organizaĵo Universala Esperanto-Asocio, jam alportis tre konkretajn rezultojn. Mi estas ankaŭ feliĉa konstati, de Sveda Esperanto-Federacio, kiu nun festas sian 50-jaran jubileon, modele partoprenas en tiu internacia kunlaboro. Konstante la karakteriza trajto de nia federacio kaj de la plej multaj el ĝiaj grupoj estas optimisma aktiveco. Kaj tiu optimismo, tiu volo formovi montojn, nepre kondukos al la fina venko de la internacia lingvo.

Ernfrid Malmgren

Karaj gesamideanoj en Svedujo!

La sciigo pri la proksimiĝanta ora jubileo de la Sveda Esperanto-Federacio haltigis min en la taga laboro kaj rekondukis en la memoro al via bela lando kaj al la glora tempo, kiam mi kune kun vi laboradis por la venko de la verda stelo.

Memorante pri nia kamarada kunlaboro sub la saĝa gvido de la karmemora rektoro Jansson, pri miaj vizitoj al la urboj kaj vilaĝoj kaj al multaj samideanaj hejmoj en Svedujo, pri la triumfoj de nia lingvo tra via tuta lando kaj precipe en la Koncerta Domo de Stokholmo kaj en la Sveda Parlamento, mi sendas nun fratan saluton al vi ĉiuj, kiujn mi ankoraŭ ne konas, sed kun kiuj ĉiuj spiritan komunecon mi sentas.

Mi gratulas al vi pro la modela movado, kiun vi per energia kaj lerta laborado konstruis, kaj mi sentas min feliĉa, ke ankaŭ mi havas iom da rajto partopreni en via jubilea ĝojo.

Hago, 11 apr. 1956.

Andreo ĉe



Ernfrid Malmgren,
prezidanto de UEA.
Eksprezidanto de SEF



Andreo ĉe
direktoro de Internacia Esperanto-Instituto.

Honorigo de 50-jara SEF



Edmond Privat
profesoro ĉe la Universitato en
Neuchâtel (Svisl.), hon. prez.
de UEA

Karaj svedaj esperantistoj,

Por la ora jubileo de via Federacio mi sendas korajn bondezirojn kaj al ĉiuj fidelan saluton.

En la plej frua tempo de nia movado la svedoj helpis D-ron Zamenhof kaj donis al li kuraĝon. La gazeto "Lingvo Internacia" savis la situacion kaj en nia unua kongreso mi, kiel knabo, respektive salutis vian grandan pioniron, Paŭlon Nylén. Estis ĝoje denove renkonti lin post duoncentjaro en Bolonjo, kiam ni ambaŭ havas harojn blankajn.

Antaŭ trideko da jaroj mi vizitis la Stokholman Grupon kaj amikiĝis kun la kara rektoro Jansson, kies memoro daŭre vivas en la koroj. Nun s-ro Malmgren gvidas nian UEA, kaj via movado, kies gazeton mi legas regule, denove kuraĝigas nian tutmondan rondon. Ĝi vivu, kresku floru!

Koran dankon pro ĉio, kion vi faris kaj faros ankoraŭ!

En amika penso mi festas kun vi kaj restas fidele via

Edmond Privat

Pro la 50-jara jubileo de la Sveda Esperanto-Federacio mi sendas miajn korajn gratulojn. Ne nur ĝia vere efika kaj sukcesplena laboro estas gratulinda, sed ankaŭ la amika spirito, kiu regas inter ĝiaj anoj kaj kiun ĉiuj spertas, kiuj vizitas Svedlandon.

Mi memoras la koran akcepton, kiam mi vizitis la mondfederalistan kongreson en Stokholmo en la jaro 1950 kaj ankaŭ la agrablan tempon en Frostavallen en 1953, kie la svedaj gastigantoj faris ĉion por doni al la partoprenantoj neforgeseblajn tagojn.

Ke la Sveda Esperanto-Federacio kun la samaj energio kaj sindono daŭrigu prepari la vojon al nia komuna idealo: la plena enkonduko de Esperanto en la tuta mondo!

Julia Isbrücker

Den Haag, Nederlando



Teo Jung
redaktoro de Heroldo
de Esperanto



Julia Isbrücker
viceprez. de
Universala Ligo



L. L. Zamenhof
aŭtoro de
Esperanto

La unua honora
prezidanto de
Sveda Espe-
ranto-Societo

1859—1917

Bled, Jugoslavio en aprilo 1956

Kara redaktoro!

Ĉu vi vidas ion kontraŭsencan en tio, ke apud la ĉarma lago de Bled, la juvelo de Jugoslavio, en la suna sudo de nia kontinento, kie mi restas en tiu ĉi momento kun miaj edzino kaj filo okaze de nia "dua edziĝvojaĝo", miaj pensoj vole-nevole migras al alia lago, al Mälaren, al la bela ĉefurbo ĉe ĝiaj bordoj, al la paca lando en la alta nordo, al la karaj samideanoj-amikoj svedaj, kiuj festos post nelonge la Oran Jubileon de sia landa Esperanto-organizaĵo?

Certe, la pejzaĝo estas tute malsama. La ĉielplafono, la akvo de la lago mem, la tuta sfero kaj atmosfero — ĉio estas malsama. Sed mi ne ja ne volas kompari. Donas tamen apartan plezuron, konstrui al mi spiritan ponton de la sudo al la nordo, de Bleda lago al Mälaren, de ni, arĝentjubleuloj, geedzoj de 25 jaroj, al vi, orjubleuloj en Svedujo. Kaj jen reaperas antaŭ mia spirito ankaŭ la rememoroj, — rememoroj multaj, agrablaj, amuzaj, pri ĝojigaj horoj, tagoj, semajnoj pasigitaj en via lando.

Trifoje mi metis mian piedon sur teron svedan. La unuan fojon antaŭ pli ol tridek jaroj, vizitonte mian fratinton, kiu dum tuta jardeko trovis komfortan hejmon en via ĉefurbo, dank' al la komplezo de Stokholmaj samideanoj.

La duan fojon mi vizitis Svedlandon en 1934, okaze de la 26-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo, el kiu restis al mi rememoroj pri grandioza kongresejo, bonege sukcesinta balo en ruĝa(!) "Blua Salono", epizodoj emociaj kaj epizodaj amuzaj.

Mia tria vizito al Svedlando okazis precize antaŭ unu jaro, laŭ invito de la prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio, por fari prelegon dum la jar-kongreso de la Federacio. Ankaŭ el tiu vizito mi kunportis agrablajn rememorojn, precipe pri gesamideanoj laboremaj, celkonsciaj kaj komplezaj.

Svedlando kaj svedaj gesamideanoj por ĉiam havas honoran lokon en mia koro; nomoj kiel, ekzemple, rektoro Jansson, red. Nylén, Halldor, Malmgren, Strömme ktp. ja restos neforgeseblaj.

La arĝentjubleuloj kore salutas la orjubleantan Federacion okaze de la eksterordinara festo kaj plej kore gratulas!

Teo Jung

Rememoro pri rektoro



La unuan fojon mi renkontis rektoron Sam Jansson paske 1927 en Prago ĉe la internacia pedagogia konferenco pri "Paco per la lernejo" (sub la prezidado de eksterafera ministro E. Beneš kaj profesoro P. Bovet de Genevo). La duan fojon ĉe mia alveno al Stokholmo la 28-an de septembro 1928.

Kun staturto alta kiel la urbodoma turo de Stokholmo kaj okuloj mildebluaj kiel la helĉiela fono de la bela sveda flago.

Li estis rektoro de la Beskowa Liceo (kie studis interalie reĝo Gustavo V, Hjalmar Branting la granda pioniro de la sveda socia demokratio kaj multaj aliaj granduloj). Pleje li prizorgis ne la elstarajn "lumojn" sed la "malfacilulojn".

Al ĉiuj studemuloj esperantistaj en kiu ajn socia klaso au unuigo li senavare donacis el sia instrua kaj instiga kapablo.

En la sama monato kiam la Sveda Esperanta Federacio atingis sian 30-jaran ekzistadon, rektoro Jansson atingis sian 60-an vivjaron. Ne tre forta estis la sveda esperanto-movado, kiam la Rektoro kaptiĝis de nia ideo, sed grava parto de la postsekvintaj prosperoj okazis dank' al li.

Modela gvidado de la Sveda Esperanto-Instituto, (pluraj centoj da kandidatoj ekzamenitaj de li mem) la koresponda kurso, esperantaj elsendoj en la sveda radio, verkado de esperantaj lernolibroj, altkvalita kompilado de la Sveda Antologio estas mejloŝtonoj.

Kiu konis rektoron Jansson de pli proksime impo-
nigis de la genieco de lia naturo kaj lia spirita nobleco, kaj ĉiuj kapitulacis je lia persona ĉarmo.

Okaze de la ora jubileo federacia rumana verdste-
lano demetas kronon plektitan el dankosento, korvarmo kaj memorsuna radiaro ĉiambrila al sia sveda Mentoro.

T. M.

Ĉu vi deziras partopreni?

- 1) karavanvojaĝon al **Grekujo**, per trajno, 1—18/7 1956. — 1.174 d. kr. = 880 sv. kr.
- 2) karavanvojaĝon al **Bardolino** (Lago de Garda), per trajno, 16—27/7 1956. — 546 d. kr. = 410 sv. kr.
- 3) internacian ferian kurson en **Helsingør**, 28/7—4/8 1956. Kostoj: 125 d. kr. = 95 sv. kr.
- 4) internacian aŭtunan kurson en **Vejle**, 14—21/10 1956. Kostoj: 120 d. kr. = 90 sv. kr.

Detala programo pri ĉiu aranĝo senpage havebla. Skribu baldaŭ al

L. Friis
Ingemannsvej 9, **Aabyhøj**, Danlando

El la kongreslando:

NOLL

Sur la sojlo de nia universala kogreso okazonta la unuan fojon en fratlando Danujo ŝajnas al ni aktuale represi festprologon verkitan de la talenta dana esperantopeto Paŭlo Thorsen okaze de la 80-a naskotago de la respektinda pioniro **Margareto Noll** en Kopenhago 1954.

M. Noll eternigis sian nomon en la esperanta historio kiel senekzemple energia defendanto de la zamenhofa lingvo kontraŭ la Ido-leono profesoro Jespersen. Kiam Zamenhof — pro eksplodo de mondmilito en 1914 — devis reveturi de la neokazinta kongreso en Parizo tra Svedujo-Finlando-Peterburgo al sia familio en Varsovio kaj perdis la kontakton kun sia frato Felikso kaj ties edzino, estis f-ino Noll kiu sukcesis rekontak-
tigi ilin.

La historiajn prelegojn de mia altestimata blankhara kolemino, M. Noll, ĉe la Internacia Alternejo en Elsinoro ni certe ne forgesos tiel facile kiel ŝi forgesis niajn paŭzojn, kiujn ŝi transformis je aldona instruado pri vegetarismo. (Sia populara nomo estas "la mal-kanibalo".)

Io Iu

Leander Tell:

Några minnen från de 50 åren

Ar 1906 hade jag i julklapp av min bror fått en liten engelsk esperantonyckel, som jag i en blå anteckningsbok översatte till en esp.-sv. och sv.-esp. ordbok. Jag fick på så sätt kontakt med det brittiska esp.förb., där jag även blev medlem, eftersom jag icke kände någon svensk esperantist. Sedermera kom jag i korrespondens dels med hypotekskamrer B. Arre i Linköping, som från volapük övergått till esperanto, dels med ing. R. Pehrsson i Gävle, med vilken stad jag senare underhöll livlig förbindelse. Den 25 maj 1913 bildade vi några vänner Norrköpings esperantoförening La esperanta stelo, som genom kurser, tidningspropaganda och egna publikationer rönt en viss framgång, gynnad av bl. a. rektor A. Hacklin och gymnastikdir. R. Liljegren.

Svenska esperantoförbundet förlade sitt årsmöte 1915 till Norrköping, där på vännerna P. Nyléns och G. Wahlunds energiska rekommendation föreningen anslöt sig till förbundet, och där det spelades teater på esperanto under medverkan av bl. a. Sven Jerring. Sedermera kom jag i egenskap av revisor under en följd av år att deltaga i förbundets arbete.

Efter avflyttning till Stockholm blev jag sekr. i därvarande esperantoförening och tog initiativ till dess propagandafond. Som en ljuspunkt minns jag särskilt föreningens 10-årsfest i Victoriasalen med uppträdande av bl. a. Ivar Hedqvist. På världskongresserna i Haag 1920, Prag 1921 och Helsingfors 1922 diskuterades esp. som affärsspråk och bildades en särskild organisation för detta ändamål. Den svenska sektionen lade ned mycket arbete på att införa esp. i praktiken. Samtidigt var jag sekreterare i borgmäst. Carl Lindhagens världsspråkskommitté, vilken år 1920 ingick med en hemställan till Nationernas Förbund.

På senare år har jag icke aktivt deltagit i esperantorörelsen, men en gammal esperantist känner det alltid kärt att eljest alltid använda sitt andra tungomål.

Pionira paro



Margarethe Noll

Kara Nollo,
vivofreŝa venksimbolo
de asketoj!
Inter laŭroj kaj bukedoj
plektas sin la epitetoj.

Veterano,
glora kaj honora ano.
Flirtas flago
feste, ĉar en tiu tago
vin omaĝas Kopenhago.

Pioniro,
ĉiam plena de inspiro.
Milda saĝo
brilas sprite sur vizaĝo
juna spite al la aĝo.

Humanisto,
preta ĉie por asisto.
Dum militoj
via helpo al kaptitoj
restas inter la meritoj.

Oratoro
kontraŭ baroj kaj ignoro.
En Danlando
"Ido" apud "Jesperanto"
tordis sin sub via plando.

Defendanto
de la pura Esperanto.
Preskaŭ febra,
ke la lingvo restu nepra
fundamento netuŝebla.

Instruisto
kun petolo kaj insisto.
Vi persvadas,
propagandas kaj debatas,
konvinkitojn konvinkadas!

Apostolo
kontraŭ karno, alkoholo.
Ĉiu plago,
kafo, teo kaj tabako
malaperu en kloako!

Paul Nylén:

Nylén, la sveda tradicio:
Agema, ĉarma veterano.
Vortarojn verkas li kun amo,
Logika cerb', profunda scio.

Post kvindek-jara uragano
Kaj redaktor-erudicio
Nylén, la sveda tradicio:
Agema, ĉarma veterano.

Kun nelacigebla konscio
Portas la torĉon de l' movado
Ehigas sur la barikado
La vortojn de l' Akademio

Nylén, la sveda tradicio.

Sándor Kassai

La aŭtoro
de lerniloj kun fervoro.
Gramatiko,
via glavo, kun logiko
fulmas en la polemiko!

Kongresano,
vigla en la karavano.
Bonhumoro
estas via ĉefmotoro,
ĉiam preta por deĵoro.

La patrino
de l' movado kun inklino.
Ni memoras.
Vi laboris kaj laboras.
Tial dankas ni kaj gloras.

Homo homa,
laŭsignifa kaj laŭnoma.
Pro fidelo
restos vi por ni modelo
sur la marŝo al la celo.

Poul Thorsen
(Rozoj kaj urtikoj)

Ebbe Vilborg:

La maturiĝo de esperanto

El prelego farita de Docento
Vilborg ĉe 50-jara jubileo de
Esp. Klubo en Malmö.


Jubileoj, eĉ oraj, okazas nuntempe preskaŭ ĉiujare en la esperanta movado. Jubileas societoj, kongresoj, federacioj, kaj ne daŭros longe ĝis la lingvo mem festos sian diamantan jubileon. Je tia solena okazo oni laŭ kutimo rerigardas, farante al si la demandon: Kiun pozicion ni atingis? Kiaj estas la rezultoj? Kaj ne ĉiam la raportoj estas tiel favoraj kiel en tiu ĉi prospera klubo. Ofte ni devas konstati ke la rezultoj atingitaj ne respondas al la streĉoj faritaj. Sed mi petas vin dum momento flankenlasi la praktikan agadon por rigardi nun la lingvan aspekton. En tiu direkto niaj okuloj vidas nur luman perspektivon. La grandioza lingva eksperimento, en kiu ĉiuj esperantistoj partoprenas, sendube montriĝis sukcesa — kaj tio ja estas la nepre necesa premo por plia efika agado estonta.

Nature ne eblas eĉ skizi la lingvan evoluon de esperanto en kelkaj minutoj kiuj rapide forflugas. Tie ĉi mi nur volas akcenti la diversecon inter la situacio de esperanto antaŭ kvindek jaroj kaj nia nuna lingva situacio.

Se ni komparas esperantan tekston de la unuaj jardekoj kun hodiaŭa teksto, ni ne vidas grandan dife-

rencon. Tie kaj tie ni rimarkas iun vorton, kiu nun estas konsiderata kiel arĥaika, sed vane oni provus meti ajnan esperantan tekston en la ĝustan jardekon nur helpe de lingvaj karakteriziloj. Pri tiu fakto ni prave fieras, ĉar ĝi pruvas la stablecon de nia lingvo. Faru poste la saman provon je ekzemple svedlingvaj tekstoj! Ne nur la ortografio ŝanĝiĝis, sed la vortprovizo kaj la stilo havas tute malsaman karakteron; al senpripensaj homoj teksto sveda el la komenco de nia jarcento ofte faras iom komikan impreson. Du konkludoj eblas: aŭ la sveda lingvo ŝanĝiĝis pli ol la lingvoj ĝenerale en tiu periodo, aŭ la kreinto de esperanto sukcesis doni al sia lingvo formon kiu kapablas esti aparte stabila. Mi kredas je la dua alternativo, kaj mi iom poste revenos al tiu vidpunkto.

Ni do konstatis, ke ni vidas malmulte da ŝanĝoj en esperanto dum kvindek jaroj. Kaj tamen disvolviĝis proceso tre grava por la lingvo, proceso ne tre rimark-ebla supraĵe sed komprenebla el la historio. Mi povas priskribi ĝin tiel: antaŭ 50 jaroj esperanto ankoraŭ estis eksperimento antaŭ nelonge elirinta el la stud-



ĉambro; hodiaŭ ĝi nedisputeble estas vivanta lingvo. Mi emas nomi tiun proceson la maturiĝo de esperanto, transiro de necerta provizora ekzistado al certa konstanta vivoformo. Per tio maturiĝo ni gajnis netaks- eblajn ecojn por nia lingvo: stabilecon, pretecon, evolu- kapablon.

Vi konas la serion de argumentoj kontraŭ planling- voj, argumentoj kiujn ni kun rideto rekonas de jaro al jaro, de jardeko al jardeko: tia lingvo ne povas havi literaturon, ĝia prononco devas varii en diversaj nacioj, ĝi nepre disfalos en dialektojn k.t.p. Tiuj argumentoj estis la samaj en 1906. Sed imagu al vi la situacion de la tiama esperantistaro! Ilia literaturo estis nur embrio, kaj ili ne certe sciis ĉu la lingvo povos konservi sian unuecon; male ili ĵus vidis la disfalon de alia lingvosistemo, nome Volapük. Sed kiam nuntempe dub- emuloj atakas nin, ni povas trankvile montri al la praktikado de la lingvo. Vizitu kongreson kaj poste diru, ke esperanto ne estas parolebla! Legu originalan romanon kaj poste asertu, ke esperanto ne taŭgas kiel literatura lingvo! Per la uzado de esperanto la argu- mentoj kontraŭ lingvoj "artefaritaj" plene fiaskis. Eĉ ne la profesiaj lingvistoj povas neglekti la pruvon kiun prezentis esperanto al la mondo. Ke la lingvo- scienco ne sufiĉe atentis nian ekziston, tio estas alia kaj bedaŭrinda fakto. Sed la eminenta franca lingvisto Meillet, specialisto pri kompara lingvistiko, tre ĝuste resumis la atingajojn de esperanto per sia deklaro: "Ĉiu diskutado teoria estas vana, ĉar esperanto funkcias". La teoriaj argumentoj kontraŭ ni estas frakas- itaj per la praktiko. Kiom tiu gajno signifas por nia propagando, ne necesas diri.

En 1906 plue ĉiu novaĵo estis danĝero. Tiu aserto eble ŝajnas al vi aŭdaca. Vi ja diras: sed jam tiam ekzistis la fundamento de nia lingvo, jam tiam ĝi do estis egale stabila kiel nun. Sed se ni reiras nur an- koraŭ dek jarojn, ni trovas, ke Zamenhof mem ne estis eerta pri kelkaj gravaj detaloj en sia projekto sed proponis ŝanĝojn al voĉdonado. La publikado de la fundamento certe celis fari finon al tiu periodo de ne- stabileco; ĝi do ne estis registrado de uzo jam certa, sed ĝi volis fiksi la uzon por la estonto. Jam la sekvan jaron venis la konata krizo, kiun ja por longa tempo haltigis nian lingvon. Ke tia pala projekto kia Ido povis skui la tutan esperantan movadon, tio pravas ke la lingvo ankoraŭ ne trovis nedisputeblan formon. Nun- tempe ni ne timas tiajn danĝerojn. La problemo pri akcepto de internacia lingvo fariĝis la problemo pri akcepto de esperanto. Ni havas neniujn seriozajn kon- kurantojn, kaj el interne apenaŭ povas minaci danĝeroj kiuj detruos nian lingvon. Tiel nomataj reformpropo- noj povas vekti ekscitiĝon sed ne povas trafi la kernon de la lingvo. Ĉio mortos, ĉio forvelkos, kio ne estas en konkordo kun nia fundamento. Esperanto ne havas la ŝanceliĝantan stabilecon de natura lingvo; ĝi estas eĉ pli stabila, ĉar ni esperantistoj lernis respekti la fun- damenton multe pli ol la nacilingvanoj respektas la gramatikajn leĝojn de siaj lingvoj.

En 1906 la lingvo ne estis tuj preta por ĉiukampa servado. Certe la unuaj aŭtoroj faris miraklojn per la malvasta tiama vortmaterialo kaj montris, ke ĝi bone sufiĉas por literatura verkado. Sed nun ni atentas ankaŭ la faklingvojn, konsiderante ke unu el la ĉefaj taskoj de la internacia lingvo estos funkcii kiel interkomprenilo de specialistoj ĉiulandaj. El tiu nun- tempa vidpunkto ni ja devas konstati, ke la tiama es- peranto nur estis la unua etaĝo en la granda konstru- aĵo de la interlingvo. Kompreneble Zamenhof mem konsciis tion, dirante ke la estonto kompletigos la labo- ron. La posta generacio plikonstruis, kaj hodiaŭ pli ol cent fakaj terminaroj aperis; nia lingvo enpenetris en ĉiujn profesiojn kaj metiojn. Ne estas troigo, se ni hodiaŭ deklaras al la mondo, ke nia lingvo estas tuj akceptebla, tuj servopreta.

Sed la plej grava gajno eble estas, ke ni trovis vojon por la lingva evoluo. Je tiu komplikita problemo oni devis meti demandan signon ankoraŭ en 1906. Kio oka- zos, kiam Zamenhof mortos? Ĉu estos eble direkti la evoluon? Nun ni lernis, ke la lingvo ne devas esti di- rektata. Per tio mi aludas al la fakto, ke la esperan- tistoj mem decidis, kiuj novaj vortoj estu uzataj. Ek- zistas aliaj projektoj, kiuj provis la kontraŭan metodon dekrete decidi akademie pri ĉiu unuopa vorto. Tia lingvo ne povas vivi liberan vivon. Estas pruvo pri la forto de nia lingvo, ke ni kuraĝis lasi al la uzado decidi pri neologismoj. Samtempe tiu metodo, almenaŭ kun longa perspektivo, garantias ke nur internacie kompreneblaj esprimoj travivas, ĉar la esperantistoj ĉiam kontaktiĝas kun alilandanoj kaj do ĉiam serĉas la plej internacian manieron por paroli. Jen tio, kion mi persone konsideras la plej granda atingajo de espe- ranto: la ekesto de internacia frazeologio, kreskanta de jaro al jaro. Restas ankoraŭ la tasko kolekti tiun grandegan trezoron da esprimoj, trezoron kiun ni tro- vas en la literaturo kaj en la konversacio de divers- naciaj esperantistoj, trezoron kiu ebligas al homoj pa- roli kun homoj, se mi rajtas uzi la konatan zamen- hofan eldiron.

Esperanto evoluis ne nur el interne, per propraj ri- medoj; ĝi ankaŭ lernis asimili ĉiujn novajn terminojn bezonataj en la moderna vivo. Vidu la suplementon de Plena Vortaro: ĝi estas kvazaŭ katalogo de novaj internaciaj konceptoj. Se vi bone memoras la funda- mentan gramatikon, vi scias, ke la internaciaj vortoj estas tie nomataj fremdaj. Vere, nuntempe la inter- naciaj vortoj ne estas fremdaj en esperanto; ili trovis tie civitanecon kaj hejmon. Se nia lingvo volas esti en la centro de monda atento, ĝi certe ne povas stari flanke de la novaj internaciaj terminoj.

Ĉu do la lingva unueco ne estas en danĝero, se la lingvo libere kreskas kaj evoluas? Ni konstata, ke disfalo dialekta neniel estas neevitebla sorto de lingvo. Male: konstanta interkontakto kreas lingvan unuecon; nur rompo de la interrilato kaŭzas lingvajn diferen- cojn. Ĉar tiel estas, ni esperantistoj havas unike fortan pozicion, ĉar nia lingvo ekzistas nur por kaj per inter- naciaj kontaktoj. Vortoj kaj diroj kiuj estas tro naciaj, tro malvaste kompreneblaj, forfalas, ĉar ili ne taŭgas en la internacia trafiko kiun ni esperantistoj konstante daŭrigas.

Eble iuj el vi ekhavis la impreson ke mi kalumnias la fruan epokon kaj tro laŭdas la ĉitagan esperanton. Nenio estas pli falsa ol tio. Estas kompreneble per si mem, ke la plej multaj malfaciloj aperas ĝuste en la krea periodo, kaj mi substrekis nian hodiaŭan fortan lingvan pozicion nur por akcenti, kion ni ŝuldas al la pioniroj de la unuaj jaroj kaj kiel dankaj ni devas esti, ĉar ni nun staras sur firma fundamento. Multon ni transprenis senpene kaj senpage de la pioniroj, kaj ni havas pli favoran elirpunkton ol ili. Sed parolante pri la nuna lingvo mi ne povas ne emfazi nian respondecon al venontaj esperantistoj. Ni havas ling- von servopretan kaj servokapablan; nia tasko devas esti daŭre adapti ĝin al ĉiuj novaj aspektoj de la mo- derna vivo. Se ni serioze traktas nian aferon, ni devas opinii, ke nun ni tenas la ŝlosilojn de la estonta mond- lingvo; ni gardas la lingvon, kiu espereble morgaŭ es- tos la lingvo de la homaro. Tiu pozicio estas kaj treege interesa kaj ekstreme respondeca. Ĝuste la libera evo- luo donas al ni pli grandan respondecon. Se malsanoj atakas esperanton, ni ne povas setnkulpigi nin mon- trante al iu supera instanco. Kulpas tiuokaze nur ni mem, la uzantoj de la lingvo. Sed ĉiu esperantisto kiu vere majstras la lingvon kaj scias uzi ĝin klare kaj pure, kontribuas al la tiel grava flegado de la mondlingvo.

Nia movado forlasis la kreaan periodon kaj matur- iĝis lingve kaj praktike. Se la nunaj esperantistoj ĝuste sentas sian respondecon, la periodo de matureco povas transiri al periodo de perfekteco.

Vilhelm Bartel:

La lingvoj de Eŭropo

Daŭrigo el n-ro 1/56.

La lingvo de la Feroa-insularo estas io inter la islanda kaj la dana.

Al la okcidenta branĉo de la ĝermanaj lingvoj apartenas la angla lingvo kun iom pli ol 200.000.000 parolantoj, la germana kun proksimume 100.000.000, la nederlanda kun 9 milionoj aŭ kune kun la flandra 13 milionoj nur en Eŭropo + certa parto de la loĝantaro de nunaj aŭ antaŭaj koloniaj regnoj de 80 milionoj, la friza lingvo, parolata en partoj de Norda Nederlando kaj la germanaj marinsuloj, la judgermana lingvo (yiddish), uzata de germandevenaj hebreoj (t. n. aŝkenazoj), ĉefe en orienteŭropaj landoj, sed ankaŭ ekz. en Usono, kaj unu lingvo ekskluzive parolata ekster Eŭropo, la sudafrika aŭ kabholanda, unu el la du oficialaj lingvoj de la Sudafrika Unio. Tiu lasta, kiu certe estas la plej facila el la ĝermanaj lingvoj, estas kompreneble ekster nia temo.

Se oni komparas la tri unuajn kaj plej gravajn lingvojn, ŝajnas, ke la plej granda simileco ekzistas inter la germana kaj la nederlanda lingvoj, dum la angla staras iom flanke. Tio estas pli akcentata per cirkonstanco, ke la angla lingvo en sia historio, ĉefe kaŭze de la t. n. "normanda konkero" alprenis grandan kvanton de latinidaj vortoj, kiuj fariĝis pli intima parto de la lingvo ol la krome malpli granda kvanto de latinidaj t. n. fremdvortoj en la du aliaj (kaj ankaŭ la skandinava lingvoj). Tamen la gramatiko restis pure ĝermana, kaj tiaj estas ekz. ankaŭ ĉiuj neregulaj verboj. Aliflanke la germana lingvo spertis specialan proceson en la t. n. "altgermana sonŝanĝo" (hochdeutsche Lautverschiebung), kiu ekz. kaŭzis, ke oni skribas ofte la literon z, prononcata c, en vortoj, en kiuj aliaj ĝermanaj lingvoj havas t, kaj kiu plimalproksimigis ĝin de aliaj ĝermanaj lingvoj. (Komparu ekz. la diversajn vortojn por 2 en aliaj ĝermanaj lingvoj: too, twee, to, två, tveir kun la ĝermana "zwei".)

La dialektaro de la nordgermana ebena, la t. n. "platgermana", kiu ne partoprenis en tiu proceso, estas tial pli proksima al ĉiuj aliaj ĝermanaj lingvoj ol la altgermana, al ĉiuj kun sola escepto de la judgermana, kiu estas pli proksima al la altgermana. La germana lingvo konservis en certa grado specialajn deklinaciajn

formojn de la substantivo kaj adjektivo en 4 kazoj same kiel la islanda, sed vokalo povas nur ŝanĝi inter singularo kaj pluralo, kaj ĉiam en la direkto de la t. n. "Umlaut", a al ä, o al ö, u al ü, ne inter diversaj kazoj de la singularo (aŭ de la pluralo). En la konjugacio ekzistas krom la vokalaŝanĝo inter diversaj verbttempoj ĉe la "fortaj" verboj kaj inter singularo kaj pluralo ĉe certaj neregulaj ankaŭ speciala vokalaŝanĝo en la 2a kaj 3a persono de la singularo de la estanta verbformo (ich gebe, gibst), sed neniam aperas pli ol 2 diversaj vokaloj en la sama verbttempo, kiel en la islanda. Ekzistas iom pli da pluralfinajoj ol en la sveda lingvo kaj pli da variaĵoj povas okazi per uzo aŭ neuzo de la "Umlaut". Kiel la islanda ankaŭ la germana lingvo konservis la originajn 3 genrojn de la substantivoj, dum en la dana, sveda kaj norvega lingvoj la maskulina kaj feminina genro — krom por la personaj pronomoj kunfandiĝis, tiel ke almenaŭ por la substantivoj restas nur, kion la danoj nomas fælleskøn" kaj "intetkøn", dum la nederlanda estas sur la sama vojo, sed ne atingis la celon, kaj en la angla lingvo la genraj diferencoj malaperis.

La angla lingvo havas inter la eŭropaj ĝermanaj lingvoj la plej malmultajn fleksiojn: -s por genitivo kaj pluralo de la substantivo, -s, -ed kaj -ing por la verbo, -er kaj -est por la adjektivo kaj -ly por la adverbulo, estas ĉio, almenaŭ se oni malatentas la neregulajn formojn. La nederlanda deklinacia sistemo estas iom pli simpla ol la ĝermana, sed estas en la praktiko plej anstataŭata per la deklinacio helpe de prepozicioj. La judgermana lingvo, kiu uzas hebreajn literojn kaj tial skribas de la dekstra al la maldekstra flanko, havas plej vortojn germandevenajn, ofte iom ŝanĝitajn, sed enmiksas certan kvanton da hebreaj vortoj — skribataj en aparta, senvokala ortografio — kaj malpli grandan da slavaj (dus luŝin = la lingvo, der malpe = la simio de la pola matpa. La gramatiko montros tre interesajn trajtojn, kiel ekz. la kompletan mankon de imperfekto (estinta tempo), anstataŭata per la perfekto (mi estas leginta anstataŭ mi legis) aŭ en rakonto la prezento (estanta tempo), la uzon de la vorto por "kio" anstataŭ "kiu" kiel relativa pronomo post substantivo aŭ aldonon de persona pronomo al la relativa (la viro, kiu estis hebreo = der man, vus er is a jid).

Rilate la vortordon oni havas en la skandinava lingvoj, la ĝermana kaj nederlanda la t. n. "inversion", t. v. d., ke subjekto kaj verbo interŝanĝas siajn lokojn, se la frazo komenciĝas per io alia, ekz. objekto aŭ adverbulo (hodiaŭ venas li), sed ne en la angla, tamen nur la germana kaj la nederlanda grupo havas la verbon en la fino de la dependa frazo kaj la partupon en la fino de la ĉefa (la dramo, kiun mi hieraŭ en la teatro vidis aŭ vidinta estas; mi estas hieraŭ en la teatro la dramo vidinta), la nederlanda estas tamen malpli rigora ol la germana tiurilate kaj en detaloj la reguloj diferencas.

Komunaj trajtoj en la ĝermanaj lingvoj estas i. a. la divideblo de la verboj en malfortajn — kun konstanta radiko kaj pli-malpli regulaj finaĵoj — kaj fortajn — kun vokalaŝanĝoj kaj aliaj finaĵoj — kaj la ekzisto de certa klaso de modulaj verboj, kies konjugacio en la estanta tempo rifuzas obei la regulojn por ĉiuj aliaj verboj, ekz. ĝi en la tria persono de la singularo en la skandinava lingvoj ne akceptas la literon -r, en la angla ne -s, en la ĝerman-nederlanda grupo net: komparu ekz. la formo por (li) "povas", kiu estas preskaŭ la sama en ĉiuj ĝermanaj lingvoj. Fine almenaŭ unu ekzemplon por la parenceco de la vokaloj: en ĉiuj ĝermanaj lingvoj oni povas transformi muson al pediko, anstataŭigante la literon m per l, almenaŭ en ĉiuj, kiujn mi povis kontroli. Tio validas ankaŭ por la pluraloj, ĉe se ili estas neregulaj kiel en la sveda kaj angla lingvoj.

(Daŭrigota)

LA NOVA ELDONO DE

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

ZAMENHOFA VERKO EN INDA VESTO!

Bele presita per eleganta litertiparo sur tre bona papero kaj fortike bindita en tolo kun surprisaj oraj kaj verdaj.

La teksto restas senŝanĝe, sed estas centoj da notoj kaj klarigoj faritaj de

William Bailey, L.K. kaj W. J. Downes,
Akademiano

Prezo sv. kr. 15: —

Mendu ĉe:

ESPERANTO

Box 19071. Stockholm 19



Sinha salutis

Svedlandon

Estimata Redaktoro de "La Espero"

Kun granda ĝojo mi aŭdas ke vi preparas specialan numeron jubilean de "La Espero". Bedaŭrinde mi malsanas kaj la kuracistoj malpermesis eĉ legadon kaj skribadon. Tamen mi volas kapti la okazon kaj gratuli vin je ĉi-okazo kaj ankaŭ saluti la svedan Esperantistaron kaj mian amikaron. Estas vere ke unue mi vizitis Svedlandon kaj partoprenis instruistan slojd-kurson ĉe la seminario en Nääs en la jaro 1928. Povas esti interese por la novaj esperantistoj iom aŭdi de mi kiel mi lernis esperanton kaj kian rilaton mi havis kun malnovaj esperantistoj. Dum vintro de 1928 mi estis en Stokholmo por studi la tieajn lernejojn sub gvidado de slojd-inspektoro s-ro Gunnar Nilson. Mi ja renkontis multajn personojn, sed ne ĉiam estis eble interparoli libere pro manko de komuna lingvo. La lingva barilo staris kiel granda muro. Pri tio mi skribis antaŭ dudek jaroj en mia verko "Hindo rigardas Svedlandon" jenan epizodon:

"Unu sabatan vesperon mi trovis ke restas nur unu cigaredo en mia skatolo. En dimanĉo, la Sankta Tago, oni ne povis aĉeti cigaredon. Do mi zorge konservis ĝin por fumi post la speciale bona dimanĉa tagmanĝo. Dimanĉo venis kaj post la tagmanĝo mi elprenis mian cigaredon, sed mankis al mi alumeto, kaj rigardante ĉirkaŭen mi iris al sinjoro kiu pumpis sian biciklan tubon. Mi montris mian cigaredon kaj angle petis lian alumetujon, sed kion li faris? Li klinis sian kapon kaj digne prenis mian cigaredon el miaj fingroj. Ekregis min sento de amuzo, kaj mi premis lian manon kaj dankis lin pro tio ke li solvis la problemon de la alumeto..."

Ofte mi spertis tian malfacilaĵon dum la unua jaro. Iam promenantante sur la stratoj de Stokholmo mi ekvidis en iu kafejo afiŝon pri Internacia lingvo Esperanto. Mi eniris la kafejon kaj scivoleme demandis pri Esperanto. Tiam okazis esperanta kurso de Pastro Andreo Ĉe. Oni kondukis min tien. Mi trovis ĝin interesa kaj komencis lerni esperanton, faris elementan ekzamenon. La lokaj esperantistoj helpis min daŭrigi la lernadon. Rektoro Sam Jansson zorgis pri tio. Mi komencis verki esperante por ekzerci la lingvon kaj tiel estiĝis la verketoj "Bengalaj fabeloj", "Ĉio restas penso sed ne faro k.t.p. Mi ankaŭ devis iri al Redaktoro Nylén por fari mezan kaj superan ekzamenojn. Nu, ĉio okazis sufiĉe rapide.

En la komenco de 1929 mia amiko s-ro Malmgren — tiam kiel sekretario de SEF, proponis ke mi faru prelegvojaĝon tra tuta Svedlando. La propono estis tro alloga por rifuzi. Ĉar mi kredis ke tio ebligis al mi intimiĝi kun la sveda popolo kaj ĝia kulturo. Kaj mi ne kredis tion vane. La rondvojaĝo estis tre sukcesa. Travagadinte ĉiudirekte la landon, mi lernis ekkoni ĝin ekstere kaj interne. Mi ne nur akiris grandnombran amikaron, sed tio ankaŭ helpis mian personan vivon kreski interne.

Dum la unua vizito mi restis en Svedlando de monato majo 1928 ĝis la monato aŭgusto 1931. Post mia

sukcesplena prelegvojaĝo tra Svedlando alvenis multaj invitoj al aliaj landoj por fari la samon. Do mi vizitis Estonujon, Latvujon kaj Pollandon. Subite mi estis alvokita hejmen. Do mi forlasis Svedlandon en septembro 1931.

En la hejmlando mi deziris enkonduki pedagogian slojdon kaj D-ro Rabindranath Tagore, la fondinto de Visvabharati-Universitato tre simpatie apogis mian proponon. Tiutempe la klera popolo ĉe ni neniel interesiĝis pri tio. Sed mi estis tute certa ke oni en Hindujo bezonas tion plej multe por povi rekoni la valoron de laboro. Cetere al ni tiam mankis rimedo kaj ankaŭ spertuloj — speciale labori por la virinoj.

Do mi proponis al D-ro Tagore, ke li permesu min reviziti Svedlandon kaj kolekti sufiĉan helpon de svedaj amikoj. Li tion faris, eĉ donis enkondukajn leterojn al siaj amikoj en Svedlando — interalie al lia amiko D-ro Sven Hedin. En la plej lasta svedlingva verko de D-ro Hedin aperis unu el tiuj leteroj. Do en 1933 mi vojaĝis rekte el mia hejmlando al Svedujo. Mi povas konstati, ke tiu entrepreno ankaŭ sukcesis kaj kun helpo de grandanimaj svedoj mi povis sendi du slojd-instruistinojn kun abundaj slojdaparatoj al Santiniketan, kie ili laboris du jarojn. Mi mem restis en Svedlando ĝis septembro 1936. Mi tiutempe subgvidado de Rektoro San Jansson studis en stokholmaj bibliotekoj pri skandinavaj literaturo kaj historio. Tiam mi vizitis ankaŭ Danlandon, Norvegujon, Nederlandon kaj eĉ Islandon. Mi estis la unua el Bengalujo kaj la dua el Hindujo kiu ĝis tiam vizitis Islandon. La esperantistoj en Islando multe helpis min trarigardi la landon. Antaŭ ol forlasi Eŭropon, mi verkis la libron "Hindo rigardas Svedlandon" kiel memoraĵon de mia studado tie.

Survoje hejmen en 1936 mi estis ankaŭ en Anglujo kaj la esperantistoj tre amike akceptis min kaj helpis min diversmaniere. Je mia surprizo mi ĉiam sentis hejmece en esperantistaj rondoj en ĉiuj landoj kiujn mi vizitis.

La supra mallonga skizo eble donos iom da ideo pri mia rilato kun Svedlando kaj la sveda popolo — speciale al la novaj esperantistoj.

En 1953 Uno elektis min el Hindujo kiel ĝian "Fellow" kaj do la trian fojon mi povis viziti Svedlandon. Bedaŭrinde mi restis nur sep semajnojn kaj pro vasta studprogramo mi ne povis bone kontakti mian amikaron.

Nun mi kuŝas kiel malsanulo, sed mia penso ofte vagadas tra Svedlando, kiu riĉigis mian vivon multdirekte, kaj kiam mi pensas pri mia ago pasinta, mi senhezite povas konstati, ke mia vivo estus tre malriĉa spirite sen scipovo de Esperanto. Verdire Esperanto malfermis al mi tute homan mondon. Miaj samlandanoj hodiaŭ eble ne povas taksi la valoron de tio, sed tamen mi esperas ke Esperanto iam disvastiĝos en mia lando kaj tiam oni povos konstati kiel Esperanto helpis hindon preskaŭ antaŭ tridek jaroj penetri hejmrondon en malproksimaj landoj. Svedlando estas mia spirita hejmlando kaj svedoj estis miaj instruistoj de la vivo.

Je la jubileo de la sveda movado mi elkore salutis mian amikaron kaj la novajn esperantistojn.

LAKSHMISWAR SINHA

Vinaya Bhavana

Visva-bharati Universitato

Santiniketan (HINDUJO)

La 25an de aprilo 1956.

Examensskrivningarnas texter publiceras i juninumret.

Tri jardekojn en la ora nordo

Antaŭ 30 jaroj vizitis D-ro Privat Stokholmon. Antaŭ 29 jaroj venis pastro Cseh norden, transdoninte la rumanan ĉefdelegitecon de UEA al sia juna disĉiplo. Mi memoras saĝan konsilon Privat-an al Cseh: ne lasu "truojn" post vi en la hejma movado... Antaŭ 20 jaroj venis hinda Sinha kaj subskribinto en Svedlandon. Mi estis invitita por trimonata prelegserio pri Rumanujo kaj gvidado de esperantaj kursoj jam por fino de aŭgusto de la jaro 1928, sed tre timis tiam de la eble ne tiom civilizita lando de la blankaj ursoj kaj telegrafe petis monatan prokraston por pripenso... Finfine tamen okazis la alveno fine de septembro tiujare. Venis invito post invito kaj el komence planitaj tri monatoj iĝis trijara restado! En 1931 — samjare kiel amiko Sinha — mi devis forlasi karan landon svedan por fosi nian sulkon csehmetodan en Germanujo, Svislando, Francujo k.t.p. Sed ĉiam revenis al mia nova hejmlando, kie mi neniam renkontis ursojn, sed ja kursojn ("Per la Cseh-metodo en la kurso lernus esperanton eĉ la urso"... deklamis en 1930 kursano en Odense). Kaj el tri jaroj iĝis preskaŭ tri jardekoj en altkultura "alta nordo" kies pramalnova civilizo povus esti modelo por multaj malpli helaj landoj sudaj. Mi spertis ke suprenorde homoj loĝas plenakorde. Ne loĝas ilin kolonioj. Nek havaĵo de najbaro. Ho, lando de preskaŭ 150-jara paco! Kia forto-sorta graco. Telefono kaj radio ĉiudome. Eĉ en malgranda vilaĝo. Kia saĝo: libroreto, ne municireto kaptas korojn, flugigas homojn. Strindberg, Selma Lagerlöf, Karlfeldt, Lagerkvist, en societo de verkaro Zamenhofa, Stellan Engholm, Kalocsay kaj Baghy... Ne nur en biblioteko. Vasta koro de nordano larĝe malfermas la pordon de varma, familia nesto al rumano kaj hungaro, al polo kun firma kolo (Forge forĝis feron ĉe ni).

Malmolas la sveda tero. Sed sub glacitavolo kuŝas grandvaloro: ortrezoro (en Boliden kaj samideana korprofundo).

Karaj kursanoj, frataj kunlaborantoj en la Sveda Movado orlima! En via, mia (dua) hejmlando estas bela kutimo, ke fine de aprilo oni forbruligas malnovaĵojn, sekajn branĉojn por pure akcepti floroportan, varmodonan majon. Ankaŭ ni, verkstelanoj, ĵetu nun ĉiujn sentojn de personaj miskomprenoj aŭ privataj ambicioj en la grandan festfajron de nia Jubilea kongreso. Kun refreŝigitaj fortoj ni komencu novan labor-epokon, kiu alkondukos nin al la definitiva venko de nia interpopola amlingvo, Esperanto!

Tiberio Morariu

Lingva debato

Respondo al S-ro Rosbach

Kara Samideano. La celo de miaj lingvaj babilajoj ne estas kritiki sed simple helpi al nespertaj studentoj de la lingvo. Jam de longa tempo mi volis ion skribi pri "undra", kaj kiam via recenzo prezentis al mi tiel bonan ekzemplon, mi ne povis kontraŭstari la tenton uzi ĝin kiel elirpunkton por mia traktajeto. Sendube tre malgranda nombro da personoj legas ambaŭ gazetojn, la norvegan kaj la svedan, kaj tial via prestiĝo espereble ne suferis de mia atentigo.

Via demando pri la ĝusta traduko de la vorto "spara" en la senco "skona" vere estas iom subtila, kaj mi timas ke mi ne estas la kompetenta instanco. Jen, tamen, mia tre subjektiva opinio.

Sendube mi mem unuavice ekpensus pri la vorto "domaĝi". PV donas jenan Zamenhofan ekzemplon: "pro spritaĵo li eĉ patron ne domaĝus". Sed la du vortoj "indulgi" kaj "domaĝi" ja estas ĉi-riilate tre sen-coparencaj kaj tial eble ankaŭ "indulgi" estus uzebla. Persone mi tamen havas ian senton ke "indulgi" po-

La potenco de l' preĝo

Augusta Lönborg (1895)

*For tra la vastaj spacoj,
preter la sun-orbit',
trans la trembrilon stelan
atingas en preĝ' spirit'.
Ĝi la flugilojn levias
alten el polva sort',
Patron kaj hejmon serĉas,
frapante sur perlopor'd'.*

*Preme malvastas mondo
trompas amikfidel';
trovas anim' firmpunkton
nur ĉe la eterna cel'.
Nokto plej nigra helos,
ĉesos la larmofont',
kiam vi iri lernos,
kun fido, sur preĝopont'.*

*Eta infan' preĝanta
vivas en plensekur'
fortas pli ol heroo
post lia kastela mur'.
Kie en mond' ni migras,
tenu ni en memor':
ĝem' de preĝanto iras
rektvoje al Patra kor'.*

Trad. Magda Carlsson (1955)

sedas iomete alian nuancon, kiun mi ne povas klare precizigi.

Fine, ŝajnas al mi ke oni sendube povas uzi ankaŭ la vorton "ŝpari" — figursence — por la koncerna koncepto (nocio?). Tiuj kelkaj lingvoj, kiujn mi havis eblecon esplori tiurilate, ŝajnas — kiel niaj propaj — uzi la saman vorton "ŝpari" egale en ĝia propra kaj en figura senco. Do, kial ni devas timi fari tion saman ankaŭ en esperanto?

Kun samideanaj salutoj Via

Birger Gerdman

SVEDA POEMARO

Tradukoj de

MAGDA CARLSSON

32 svedaj poetoj — 112 paĝoj

Sv. kr. 6:—

"... mi ja povas aserti ke malmultaj esperantistaj poetoj tiel sonore manipulas nian lingvon".

A. Nuñez Dubús "Boletín"

"Kiom da ĝuiga belo enestas en la senmankaj tradukoj de Magda Carlsson... Modesto kaj humilo spiras el pura kaj granda arto de tiu ĉi brila poezia tradukverko."

J. Korinek "Esperanto"

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack 19071 STOCKHOLM 19 Svedujo

FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO UPA

Verksamhetsberättelse 1955

Den under år 1954 påbörjade lyrikantologin Sveda Poemaro, med översättningar av Fröken Magda Carlsson, förelåg färdig i januari månad.

Sedan planerna för utgivande av en gemensam nordisk esperantosångbok omintetgjorts, har förlaget färdigställt manuskriptet till en egen sångbok, som givits namnet *Vivu la stel'*. Tryckningen av boken påbörjades under december månad.

Förlaget har vidare beslutat att under Svenska Esperanto-Förbundets jubileumsår 1956 utge framlidne lektor Ernst Olssons originalverk om svenska kulturpersonligheter genom tiderna. Boken bär arbetstiteln *Svedaj Pioniroj*. Arbetet med illustrering, bearbetning och komplettering av manuskript har påbörjats.

Förlagets expedition har även detta år föreståtts av R. Dupuis. Inom klubbarna har förlaget representerats av ett 60-tal ombud. För att stimulera dessas arbete har under året utdelats en premie om 50 kr kontant till det ombud som under två närmast föregående åren redovisat den bästa försäljningen, räknat per medlem och år. Vidare har utdelats två extra premier om vardera 20 kr i andelar till de därefter framgångsrikaste ombuden.

Omsättningen har under året uppgått till kr 28.135:—, vilket innebär en minskning i jämförelse med närmast föregående år.

Andelskapitalet har ökat med kr 290:— och utgör 26.470:— kr.

Förlagets ekonomiska ställning i övrigt framgår av bifogad rapport.

Styrelsen föreslår årsmötet att av årets vinst jämte den från 1954 balanserade 4 % utdelas till andelsägarna med kr 1.058:80 samt att återstoden, kr 2.304:33, föres i ny räkning.

Styrelsen har under året hållit sex protokollförda sammanträden. Den har bestått av Sune W. Ahlm, Solveig Carrfors och Sten Öfors med T. Julin och E. Stridell som suppleanter.

I tur att avgå är ordförande Ahlm och suppleanten Julin.

Stockholm den 10/4 1956.

Sune W. Ahlm Solveig Carrfors Sten Öfors



Dum 10 penaj sed ankaŭ interesaj jaroj (1927—37) mi redaktis la Svedan Esperanto-Gazeton —

dum ankoraŭ pli da jaroj mi en mia presejo prezigis la gazeton —

dum pluraj jaroj mi, kiel ĉefo de Eldona Societo Esperanto, administris la ĉiam malfacilan ekonomian flankon de la gazeto —

ĉu mirinde do, ke ankoraŭ hodiaŭ mi pritraktas la gazeton kvazaŭ ĝi estus mia propraĵo, mia infano,

Balansräkning per den 1 jan. 1955

Tillgångar	
Kassa	146: 04
Postgiro	4.021: 56
Bank	3.509: 40
Fordringar hos div. personer	14.820: 58
Inventarier	1:—
Varulager	26.137: 60
	<u>Kronor 48.636: 18</u>

Skulder	
Diverse personer	11.351: 79
Andelskapitalet	26.180: —
Reservfonden	5.000: —
Utdelningars konto	2.937: 75
Balanserad vinst från 1954	3.166: 64
	<u>Kronor 48.636: 18</u>

Vinst- och Förlusträkning för 1955

Inkomster	
Balanserad vinst från tidigare år	3.166: 64
Bruttovinst	11.384: 90
Rabatter och provisioner	85: 02
Bankränta	203:30
	<u>Kronor 14.839: 86</u>

Utgifter	
Omkostnader	9.722: 53
Utdelning för 1954	1.047: 20
Skatter	707: —
Balanserad vinst från 1954	3.166: 64
Årets vinst	196: 49
	<u>Kronor 14.839: 86</u>

Balansräkning per den 31 dec. 1955

Tillgångar	
Kassa	7: 38
Postgiro	3.145: 94
Bank	6.712: 70
Fordringar hos div. personer	9.753: 34
Inventarier	1:—
Varulager	28.840: 60
	<u>Kronor 48.460: 96</u>

Skulder	
Diverse personer	10.233: 58
Andelskapitalet	26.470: —
Reservfonden	5.000: —
Utdelningars konto	3.394: 25
Balanserad vinst från 1954	3.166: 64
Årets vinst	196: 49
	<u>Kronor 48.460: 96</u>

kaj ke mi kun streĉa atento (kaj kritika rigardo!) trafolumas ĉiun numeron?

Feliĉe, la decidaj instancoj de nia sveda esperantomovado ĉiam plene komprenis la vere grandan signifon de bona gazeto, kaj tial laŭpove disponigis rimedojn el sia cetere malgrasa kaso.

La klopodo de la redaktoroj ĉiam estis, ke nia gazeto estu ne nur bona, sed unu el la plej bonaj, kaj ni povas fieri pro tio, ke hodiaŭ, sub la nuna lerta redaktoro, ĝi estas konsiderata kiel modela, kaj ke ĝi sen ia dubo staras en la absoluta pinto de tiu piramido, kiun formas la internacia gazetaro esperanta.

Bernhard Ericsson



41-a Universala Kongreso de Esperanto

KOPENHAGO, DANUJO

Dato: 4—11 aŭgusto 1956.

ALIGLIMIGO: Pro la rapida kresko de la aliĝintoj, ni atentigas, ke post la atingo de la limcifero de 2.200 kongresanoj plu ne estos akceptataj aliĝoj.

Aliĝiloj: Haveblaj ĉe 41a Universala Kongreso de Esperanto, KOPENHAGO, Danujo, aŭ ĉe la sveda Peranto.

Kotizoj: La aliĝilojn kaj la kotizojn vi sendu al Malmö kaj ne al Danujo. Poste vi sendu pagon por ĉambroj kaj ekskursoj ktp ankaŭ al Malmö.

La aliĝilojn vi sendu al: **Svenska Esperanto-Förbundet, Kamrergatan 3 a, Malmö.**

La pagojn vi sendu al: **Poŝtĉeka konto 14 74 29** (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

LA KOTIZOJ de la 1-a de aprilo 1956 Svedaj kronoj
1956

Kongresano	36:—
„ , rekta membro de UEA	30:75
Edz(in)o de kongresano	18:—
„ kun UEA-rabato	15:50
Junulo, ne pli ol 20-jara	12:—
Studentoj	18:—

Plenaĝaj aliĝontoj, kiuj estas Individuaj Membroj de UEA (t. e. ricevas la jarlibron) rajtas la supre menciitan rabaton. (Edz(in)o de membro rajtas la rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familianoj. La rabato ne validas por gejunuloj kaj studentoj.)


Ekskursoj kaj loĝado

Ciuj kiuj anoncas sin ricevos rekte de Kopenhago aliĝilojn por ekskursoj kaj loĝado. Atentu! Sendu pagon al poŝtĉeka konto 14 74 29, kiam vi samtempe sendas la aliĝilojn al SEF, Kamrergatan 3 A, Malmö.

Jen la prezoj:	E 1	sv. kr.	19:—
	E 2	„	23:—
	E 3	„	37:—
	E 4	„	245:—
	E 5	„	339:—
	Komuna loĝejo	„	32:—
	Loĝeja makleroj	„	4:—

SEF jam aldonis siajn elspozojn por ĉekoj, poŝtmarkoj ktp.

LOĜEJOJ kaj **EKSKURSOJ:** Bonvolu atenti la instrukciojn en la Loĝiga Plano kaj en Ekskursaj Pro-



gramo. Lasta dato por akcepto de mendoj estas la 1-a de junio 1956. La aliĝilojn vi sendu al Malmö kaj vi pagu al la supra poŝtgira konto en Malmö.

ARTIKOLOJ: La esperantistoj estas denove invitataj sendi al la Kongreso gazeteltondadojn koncernantaj la 41-an Universalan Kongreson de Esperanto.

INFANA KONGRESETO: Bonvolu anonci partopreton antaŭ la 30-a de junio 1956 rekte al La Ludo-Ĉambro, Hartmannsvej 23, Kopenhago — Hellerup.

AKCEPTOJ: La mondkonata bierfarejo TUBORG invitas la kongresanojn al vizito en la fabriko.

GRAFIKISTOJ kaj **TIPOGRAFISTOJ** estas invitataj de la plej granda kaj moderna presejo en Danlando, GUTENBERGHUS, al fakvizito. Oni nepre anoncu sin al la Kongreso antaŭ la 30-a de junio 1956.

STATISTIKO: (ĝis fino de aprilo) Alĝerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 16, Belgujo 8, Brazilo 3, Britujo 149, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 320, Finnlando 99, Francujo 161, Germanujo 178, Grekujo 3, Hispanujo 11, Islando 23, Izraelo 2, Italujo 125, Japanujo 1, Jugoslavio 89, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo Belga 2, Maroko 15, Meksikio 1, Nederlando 106, Norda Rodezio 1, Norvegujo 97, Novzelando 1, Portugalujo 2, Sovetunio 1, Svedujo 344, Svisujo 25, Turkujo 2, Usono 15, Venezuelo 1. Sumo: 1.816 el 36 landoj (pasintjare 1.399 el 31 landoj).

SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Esperantlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet

Sveda Somera Semajno

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO invitas al nova prelegsemajno en 1956. Ĝi okazos **29 julio—4 aŭgusto 1956 en Frostavallen, Höör, Svedujo**, sekve tuj antaŭ la Universala Kongreso en Kopenhago, Frostavallen situas en suda parto de Svedujo kaj oni povas facile atingi la lokon de Kopenhago kaj Malmö.

La nombro de la partoprenantoj estas limigita (nur 80 personoj). Sekve oni tuj devas anonci sin. Petu informojn pri la restadprezoj kaj aliaj detaloj ĉe **S-ro Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo**.

Prelegos: Prof. Ivo Lapenna, Jugoslavio. Do-cento Sigismundo Pragano, Nederlando. — D-ro C. Støp-Bowitz, Norvegujo. — Prof. G. Waringhien, Francujo.

La plej aktualaj temoj estos:

La ĉefaj obstakloj al internacia kompreniĝo kaj kooperado.

**Bonvenon al Frostavallen!
SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO**



Por la kvina fojo okazos de 28/7—3/8 1956

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO en KONSTANZ

al kiu ni vin elkore invitas.

Rektmetoda perfektiga Esperanto-kurso, elektitaj kulturaj aranĝoj kaj turismaj programeroj atendas vin.

Petu informojn ĉe: IFS Esperanto, KONSTANZ, Grüngang 8, Germanujo

Semesterresa till Rivieran

Efter Kongressen i Köpenhamn anordnas en resa till franska rivieran enligt följande program.

11/8 avresa med morgontåg från Köpenhamn.

12/8 ankomst till Monte Carlo sent på kvällen.

13/8—19/8 uppehåll i Monte Carlo för vila, bad och utflykter.

20/8 avresa från Monte Carlo med ankomst till Köpenhamn på kvällen den 21/8.

Pris kr 535:—

Utförligt program på begäran från

E. W. Anjou

Södra Vägen 6 Göteborg S

Tel. 18 91 96, 18 91 97, 16 87 95

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Tegelbacken, Stockholm C.

Redaktoro: T. Morariu, Götaforsvägen 1, ENSKEDE. Tel. Stockholm 48 20 78.

Prezo de jarabono: 8 sv. kr. en Svedujo; eksterlanda abono 9 sv. kr. aŭ 22 resp.kuponoj. Unuopa numero 1 kr.

Prezo de anoncoj: 1/1-paĝo 115:—, 1/2=60:—, 1/4=35:—, 1/8=18:—, 1/16=9:50. Milimetra prezo 30 öre. Korespondanonceto: 25-vorta=3:—, 50-vorta=5:—.

SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Tegelbacken, Stockholm C.

Telefona: 20 00 43.

Postgiro: 20 12.



La oficejo estas malfermita lunde kaj jaŭde 19 h —21 h.

Kotizoj por izolaj membroj: 12 kr., junuloj 5 kr., familia membro sen gazeto 5 kr. resp. 2 kr.

Federacia estraro:

Prezidanto: Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö. Tel. 292 11.

Vizeprezidanto: Sune W. Ahlm, Nytorpgatan 23 B, Stockholm Sö. Tel. 41 45 47.

Sekretario: Harry Törnskog, Box 52, Älvsjö 1. Tel. Stockholm 47 32 88.

Viesekretario: Gulli Svensson, Skansgatan 1, Malmö. Tel. 150 70.

Viesekretario: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Hägersten. Tel. Stockholm 45 02 41.

Kasisto: Sven Samelius, Rosendalsvägen 21, Svärtinge.

Viekasisto: Sonja Morariu, Götaforsvägen 1, Enskede 7. Tel. Stockholm 48 20 78.

Studgvidanto de SEF: Einar Hult, Boställsv. 9, Arvika. Tel. 17 87. Al li sendu raportojn pri kursoj.

Ekspozicia fako de SEF: Adreso: S-ro Per Tandlund, Norra Promenaden 118, Norrköping.

Eldona Societo Esperanto s. p. r. (Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.)

Adreso: Box 19071, Stockholm 19. Ejo Sveavägen 98 VI, malf. 12.30—17.30. Tel. 31 65 01. Postgiro 578. Estro: Sune Ahlm, tel. hejma 41 45 47.

Universala Esperanto-Asocio

Peranto por Svedujo: Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm C. Telefona: 20 00 43. Postgiro 20 12.

Kotizoj 1956: Membro kun jarlibro kkr. 5:50, Membro-Abonanto kr. 14:50, Subtenanto 25 kr., Patrono 145 kr., Dumviva membro 290 kr.

Sveda Esperanto-Instituto. B. Joelsson. Postgiro 515 11.



Invito al la 12-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO en la nordmara banloko Büsum 28 julio—4 aŭgusto 1956.

La nunjara junulara kunveno de TEJO okazos en la Nordmara Banloko Büsum, kiu situas kvazaŭ sur la vojo al la kongresurbo Kopenhago. La partoprenantoj estos honorgastoj de la Banloka Administracio kaj per tio havos la eblon ĝui la ĝojojn de la somera ĉemara restado. La kostoj de la tutsemajna restado inkluzive tuttagan ekskurson ne transpasos 50:— germanajn markojn. Petu bildriĉan prospekton kun Esperanto-Teksto de 12-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO Nordseebad Büsum Germanujo Friedrichstr. 16.

